Revuo

ESPERANTO

Internacia

N-ro 580 (3) Marto 1954



Ventmueliloj en Nederlando (*paĝo* 70)

47a Jaro **N-ro 580 (3)** **Marto 1954**

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio

Fondinto : H. HODLER

Redaktoro : HANS JAKOB

Ĉion por la redakcio sendu al
ESPERANTO
Palais Wilson, Genève, Svis.
Urĝajn informojn sendu rekte
al Rickmansworth

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo ESPERANTO, abonado, reklamoj, anoncetoj sendu al
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represaĵon al nia redakcio.

Jara abono (1954) : 15 ŝil. anglaj (kun membreco kaj jarlibro 20 ŝil.)

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo £6	½ paĝo £3
¼ paĝo 30 ŝil.	⅛ paĝo 15 ŝil.

Anoncetoj pri korespondado :
2 pencoj por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj

Legantoj en 80 landoj

Eldonnombro 6000

Enhavo

Specialaj Artikoloj : paĝo

Stranguloj, fuŝistoj, parazitoj : *Hans Jakob* 65
La Internacia Lingvo antaŭ Tutmonda Areopago : *Hans Jakob* 67
Esperantistaj Legendoj : *Edmond Privat* 71
Enketo pri Esperanto : *W. P. Roelofs* 72
Vojaĝspertoj de vojaĝanta komitatano : *T. Sekelj* .. 83
Nia membraro 86
Esperantista Kulturdomo : *H. Micard* 91

39a Universala Kongreso :

Oficiala Komuniko n-ro 5 76
Haarlem, centro de pentrista vivo : *J. D. Spaling* 77
La Ventmueliloj en Nederlando : *M. de Waard* .. 79

Konstantaj Rubrikoj :

Enigma Konkurso 90
Esperantista Vivo 66
Internacia Konkurso 1954 87
Nia Forumo 88
Oficiala Informilo 93
Radio kaj Esperanto 92
Tra la Libraro 70
Tra la Mondo Esperantista 73

Revuo
ESPERANTO
Internacia

N-ro 580 Marto 1954

Stranguloj, fuŝistoj, parazitoj.

IDEALISMA movado kreiĝas el entuziasmo de la unuaj adeptoj, kelkfoje veraj apostoloj. Tiun-ĉi konstaton oni devas apliki centprocente al Esperanto. *Sen* tiu entuziasmo, sen tiu-ĉi sindono, Esperanto estus unu el la kelkcent projektoj de internaciaj kaj universalaj lingvoj, objekto de kolektemulo. Estu precizigate tamen, ke la entuziasmo de la unuaj pioniroj kiel de la granda sekvantaro de lernintoj kaj lernantoj, havis realan bazon : la geniecon de la Zamenhofa penso.

Ni bone konas la pozitivan flankon de la movado, de la lingvo, kaj la multaj valoraj manifestaĵoj de nia ekzisto. Utilas koni ankaŭ la negativan flankon, nome tiun, kiun indikas la titolo de la nuna artikolo. Altirita de la alta humana penso kiun disradias nia lingvo, la videble praktikaj rezultatoj atingitaj, ni konstatas de tempo al tempo samideanojn kiujn la publiko nomas ĉu "originalulojn" aŭ pli forte "strangulojn". Temas pri tiaj bonintencaj homoj, kiuj nepre ne volas forlasi nian teron en la sama stato kiel ili ĝin trovis: revoluciuloj kaj reformemuloj de ĉio ajn neperfekta, evidente malbona kaj maljusta. Nomi ĉi tiujn movadojn tie-ĉi ne eblas ; estus longega listo. Facile ligiĝas tia movado mondreforma je internacia lingvo. Sed groteska aperas por eksterulo, la kunigo de pluraj tiaj celadoj ĉe unu persono, dotita je apostola karaktero. La mondo mokema tuj juĝas : strangulo ! Se hazarde tia bonulo klopodas gajni iun por Esperanto, en naŭ inter dek kazoj, li malsukcesas. Kiam Esperanto ankoraŭ estis en la infanŝuoj, tiam oni ne tro atentis je tiaj fervoruloj ligantaj plurajn "idealaĵojn". Estas nun konstatite, ke kelkfoje tia esprimo de senbrida entuziasmo grave malutilas nian aferon ĉe la publiko. Neeble estas tion ŝanĝi, helpas nur metoda eduko de niaj propagandistoj. Propagandu ĉiam, sed ne ĉiel !

Alia homspeco estas la fuŝistoj. Ili abundas en ĉiu movado kaj la nia ne esceptas. Kio estas fuŝisto ? Kelkaj ekzemploj tion montru :

fuŝisto estas homo, kiu varbante iun por nia lingvo, mem ne bone konas ĝin kaj kreas impreson ke estas heroaĵo ĝin lerni. Estas homo kiu per poŝtkarto sin turnas al eminentuloj por ilin informi aŭ gajni. Fuŝisto estas tiu, kiu pro inklino ne respektas prenitan decidon en socieo aŭ komitato. Tia homo estas entute negativa, detruanta la laboron de ceteraj kunhomoj.

Por kompletigi la socian bildon de movado ni venu al la parazitoj. Ne ekzistas nobla celo, kiu ne estas misuzata, intence aŭ ne, de homoj kiuj serĉas profiti *sen* propra klopodo. La kategorio enhavas variaĵojn, de simple naiva profitemulo de aranĝoj (kreitaj el la mono de ideal-praktikaj homoj !) ĝis la individuo kvalifikebla kiel fripono. Ĉu la ekzisto de tiaj homoj inter ni estas signo de etendiĝanta movado ? Ĉiuokaze ekzistis, ekzistas kaj ekzistos parazitoj en nia movado. La plendinda konstato estas, ke ni nenion povas fari por eviti ian friponaĵon.

Konkludo : akceptante la bonaĵojn de nia ideo, ni devas malfeliĉe suferi la kontraŭon, kio ne volas diri ke ni *toleru* ĝin. Ni povas kaj devas esti indulgemaj pri la stranguloj, kiuj puŝitaj de superforta entuziasmo ne konas limon ! Estas al ni, ilin eduki. Ĉu oni povas eduki fuŝistojn estas demando ; kontraŭ ili ni estu severaj, firmaj kaj principemaj. La parazitojn ni senkompate eligu de niaj vicoj, korekte kaj klare.

Hans Jakob.

KONSTANTE PORTU
LA VERDAN STELON!

ESPERANTISTA VIVO

Naskiĝo

Kiridžija. Al Gesinjoroj Kiridžija, Delegito de UEA en Dubrovnik, Jugoslavujo, filino Anuŝka, la 14an de januaro 1954.

Datrevenoj

Dahl, S-ro **Einar**, la norda bardo, kies voĉo gvidas la kantadon de la himno dum kongreso, atingis je la 1a de Marto sian duonjarcenton. Esperantisto de 1922, li gvidis sennombrajn kursojn, verkis multuzitan lernolibron por lernejo (svedlingve) dialogojn kaj komedietojn. Partoprenas en UEA-komitato, funkcias kiel sekretario de la Int. Ligo de Esperanto-instruistoj, preleginto dum kongresoj pri pedagogiaj temoj kaj krom tio . . . supera instruisto en Uddevalla. Ano de la Urba kaj de la Gubernia Konsilantaro. Por kroni ĉion Einar Dahl estas elektita Deputito al la Sveda Parlamento, 1954.

Ni kore gratulas nian eminentan samideanon.

* * *

Šupichová, F-ino Julie, pensiita instruistino en Praha, Ĉeĥoslovakujo, distinginda samideano pro riĉa agado en nia movado, atingis 27.1.54 sian sepdekan vivojaron. Gratulon kaj bondeziron—via nomo ne estas forgesita.

La internacia help-lingvo antaŭ Tutmonda Areopago

LA jaro 1954 estas, se ne decida, tamen treege grava por ni. Por la dua fojo supernacia saĝularo, alivorte areopago, ekzamenos la aspekton de la ideo por kiu ni batalas. Por precizigi : ne temas pri internacia lingvo ĝenerale, sed pri *Esperanto*, la sola solvo forlasinta la relon de teorio kaj irinta la ŝtonplenan vojon de la praktiko. Konvenas koni la pasinton, la paralelon de simila, sed ne sama penado antaŭ tridek jaroj.

En la bruego de la kanonoj kaj de la propagando leviĝis en jaro 1917 la voĉo de la prezidanto de Usono, Wilson, proklamante siajn punktojn pri paco kaj nova interŝtata ordo. Idealistoj kaj praktikuloj kuniĝis por prepari publikan opinion, pretan akcepti tion je kio devis konduki la tiama devizo : "Ne plu milito". Ni ĉiuj partoprenis grandparte tiun-ĉi epokon de vera entuziasmo reganta ĉie. Ni ankaŭ vidis kiel la malnovaj fortoj, tiu-ĉi bruta instinkto, venkis la rezonadon. Tamen io estis atingita! Tio estis la kreo de la "Ligo de Nacioj", tutmonda instanco, kiu devis tranĉi la problemojn inter-ŝtatajn kaj intergentajn. Pri la "belec-makuloj" de tiu-ĉi kreaĵo, ni citu nur unu, eble la plej gravan : la foresto de la Sovjeta Respublikaro, de Usono kaj de Germanujo. Spite tion, la Ligo de Nacioj ekfunkciis. Anstataŭ rutinitaj diplomatoj de la malnova skolo aperis aro da homoj kun nomoj distingaj ; ni memoru la belgan Senatanon Lafontaine, Lordo Robert Cecil, kaj Fritjof Nansen.

Granda espero regis inter la Esperantistoj. Tiu-ĉi "areopago" certe konstatos propravide la komplikecon de diskutado (ĉar diskutoj ja devas esti !) inter anoj de kelkdeko da lingvoj. La momenta solvo uzi paralele anglan kaj francan estis kaj restos embarasa solvo. El tiu-ĉi konstato kaj por kontentigi aron da proponoj, pluraj *delegitoj registaraj* subskribis rezolucion, invitantan la Sekretariejon prezenti raporton al la asambleo ĝenerala. Tio okazis en jaro 1920. Subskribis la rezolucion (laŭ ordo de la subskribo) :

Sudafrika Unio : Lord Robert Cecil
Belgujo : Senatoro Lafontaine
Hindujo : Princo de Navanagar
Ĉinujo : Ministro Wellington Koo
Ĉilio : Ministro Hunceus
Kolombio : Ministro Restrepo
Haitio : Ministro Doret
Persujo : Emir Zoka ed Dauleh
Italujo : Ministro Schanzer
Ĉeĥoslovakujo : Edvard Beneš

(Dek ŝtatmembroj : 3 eŭropaj, 3 aziaj, 3 sudamerikaj, 1 afrika ! Ili reprezentis 8 lingvojn, plej diversajn laŭ strukturo).

Forestis tiam pluraj ŝtatoj, rekte interesitaj pri tiu-ĉi demando. Ilia partopreno estus doninta al la rezolucio ankoraŭ pli grandan pezon.

La rezolucio estis malakceptita de la granda asambleo, ĉefe pro la elokventa kontraŭ-argumentado de la franca delegito, Gabriele Hanotaux, defendante la tradician kutimon uzi la francan lingvon en internaciaj rilatoj.

Kelkaj datoj ilustras la evoluon de la tuta penado :

1921 : Partopreno de la dua ĝenerala sekretario de la Ligo de Nacioj, D-ro Inazo Nitobe, je la 13a Esperanto-Kongreso en Praha. Favora raporto pri la impresoj. La supra rezolucio estis akceptita kaj la sekretariejo estis invitita prepari raporton pri la instruado de Esperanto en lernejoj, submetotan al la proksima asambleo ĝenerala.

1922 : Submeto de la raporto : "Esperanto kiel internacia Helplingvo", al la ĝenerala asambleo de la Ligo de Nacioj. Ĝin akceptis 26 ŝtatmembroj por, 2 kontraŭ. La tuta demando, precipe pri la instruado de la lingvo, estis transdonita al la Komisiono por Intelekta Kunlaboro por plia ekzameno.

1924 : Akcepto de la rekomendo de la ĝenerala asambleo, doni al Esperanto la karakteron de "klara" lingvo en telegrafa trafiko (apud la latina).

* * *

Kiu konas la taktikon en tiaj "areopagoj" modernaj, konstatas tuj ion : ne kompromiti sin ĉe la publiko, sekve forŝovi tiklan problemon al komisiono, kio en plej multaj okazoj signifas nenion alian ol "enterigo senbrua". Tiel okazis kun Esperanto. La Intelekta Komisiono kiu grupigis efektive intelektulojn, sed el pasinta tempo, rekomendis la lernadon paralelan de la angla, franca, hispana kaj germana, resume de la naciaj lingvoj.

Tiuokaze surpriziĝis laiko, miregis la fakulo, sed nur la adepto ridetis kompateme !

La sola pozitiva rezultato de tiu-ĉi granda klopodado estis la diskutado antaŭ plej alta instanco tutmonda, la ampleksa raporto supre citita, la apero de la nomo Esperanto en oficiala regularo pri telegrafado. Iusence malgrasa, konsiderante la ŝveliĝintan esperon kiun ni ĉiuj havis. La raporto estis poste tradukita en deko da lingvoj kaj presita milope. La sola dokumento de la Ligo de Nacioj, kiu vidis la plej grandan disvastiĝon.

Ĉio tio formis la kadron de la tuta klopodado. Interesaj epizodoj akompanis la laboron de la Sekretariejo de la Ligo de Nacioj kaj de la Esperantistaj organizaĵoj, precipe de UEA kiu pro ĝia situo en Genève devige prenis ĉion en manon. Por precizigi tion ni kompletigu, ke la Esperantista ambasadoro, la elokventa defendinto de nia afero, estis Edmond Privat. Lia rolo kiel jura konsilanto de la Persa Registara delegito faciligis grandskale ĉion. Kompetenta en la materio, trafa en la argumentado, kutimita je la sinteno de tiaj rondoj, Edmond Privat estis la reprezentanto *par excellence* de nia afero.

La organizo de la teknikaj konferencoj, precipe pri instruado, okazinta en la Palais Wilson, la mil kaj unu detaloj necesaj por esti armita en decida momento, ĉion tion plenumis Edmond Privat. Necesis havi ekvilibron mensan kaj paciencon anĝelan por elteni, kaj ne eksplodi jam en unuaj kunvenoj de la komisiono. Unu el ĉi-tiuj komisiono-kunsidoj la verkinto speciale memoras : estis decida momento por akceptigi favoran sinesprimon. Ekstaris Ministro de plej granda ŝtato sudamerika (francemulo) kiu atakis la Esperanto-movadon en unuhora parolado. Li dissendis france verkitan broŝuron (*Contre l'octroi de l'Espéranto à la Société des Nations*),

plej fortan kondamnon de la tuta ideo. Nu, ĉiu alia estus kuniginta siajn aktojn kaj dirinta "Adiaŭ". Male, Edmond Privat, helpate de eksprezidanto de la svisa konfederacio, Gustav Ador, sciis ŝanĝi la atmosferon. Kunhelpis je tio la senbrideco de la dirita Ministro. Estis momentoj plej pasiaj por ni. Sed ni konstatis, ke la idealismo de la unuaj postmilitaj jaroj jam estas for ; mallonge, ke venkis ree la "fortoj misteraj", la inerteco, la kutimiĝo, la egoismo, negativaj ecoj de la homa naturo.

Jen kio okazis, kaj nun kelkajn vortojn pri tio, kio *okazos*. La nuna organizo de la nacioj, UNO (simple : Unuiĝintaj Nacioj, Unuigitaj Nacioj) aŭ Unuitaj Nacioj—elektu laŭplaĉe) superas la Ligon de Nacioj, ĉar enestas kaj ludas la ĉefinstrumentojn Usono kaj URSS.

Profitinte la spertojn faritajn ĉe la estinta Ligo de Nacioj, la UNO kreis sekciojn kiuj kunigas kompetentulojn ĉialandajn, ni citu nur la plej konatajn : UNESKO kaj OMS (Unuitaj Nacioj - Eduka, Scienca kaj Kultura Organizaĵo, kaj Organizo Monda por Saneco).

Estas do UNESKO, kiu reprezentas la UNO unuflanke ; aliflanke estas UEA, kiu reprezentas la (neŭtralan) Esperanto-movadon.

UEA iniciatis la kolekton de subskriboj pri Esperanto. Tiu ĉi petskribo (iniciato) formas do la "punkton de ekvojaĝo". Ĝin oni transdonis en 1950 al la UNO en ĝia sidejo en New York, en solena ceremonio. Poste la UNESKO-konferenco en Parizo 1952 akceptis rezolucion, kiu formas la juran bazon por ĉiuj sekvontaj faroj de tiu-ĉi organizaĵo (vidu *Esperanto*, januaro 1953).

Por havi precizan ideon pri funkciado de la lingvo, la atmosfero k.t.p., UNESKO bonvolis sendi Delegiton al la Universala Kongreso de Esperanto en Zagreb. Sinjoro Lebar, la delegito, havis okazon vidi kaj aŭdi, kaj niaj konstatoj estas, ke li kunportis impreson konvinkigan.

La tutan laboron ĝisnunan en tiu ĉi tiom grava penado plenumis Prof. Ivo Lapenna, helpata de Edmond Privat kaj de E. D. Durrant. Estos Ivo Lapenna kiu havos la taskon reprezenti kaj defendi nian aferon en Montevideo, kaj oni povas diri sen-rezerve ke li estas, por uzi anglan kurantan esprimon, la "ĝusta viro je ĝusta loko".

Superhoma forto necesas por plenumi la taskon donitan, ne nur fizika sed ankaŭ kvanto da morala forto. Nia advokato troviĝos antaŭ la fronto de instinktaj kontraŭuloj el motivoj plej diversaj. Ĝin subtenas la "talpoj", t.e. la propagandistoj de aliaj solvoj de internacia lingvo—ili kiuj jam influis negative ĉe la estinta Ligo de Nacioj. Sed nia ambasadoro posedas la kvalitojn fundamentajn kaj ĉefe li estas penetrita de sankta konvinko pri la bono de la afero. Eĉ se niaj esperoj ne plenumiĝos centprocente, ni ĉiam memoru ke la vojo al sukceso iras tra montoj kaj valoj plenaj je obstakloj.

Hans Jakob.

ESPERANTO

Tole-binditaj volumoj

1951 Al MA de tiu jaro 5ŝ. 6p. afr. al aliaj 10ŝ. 6p.

1952 Al MA de tiu jaro 5ŝ. 6p. afr. al aliaj 10ŝ. 6p.

1953 Al MA de tiu jaro 5ŝ. 6p., afr. al aliaj 10ŝ. 6p.

Mendu ĉe U.E.A.

Notu, ke ni sendas volumojn po 5ŝ. 6p.

NUR rekte al la koncernaj MA.

Tra la Libraro

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas ;
unuope ricevitajn nur mencias.
*=akireblaj ĉe U.E.A.

La recenzinto estas libera en sia prijuĝo de verkaĵo.
Lia opinio ne ligas la Asocion aŭ la Estraron de U.E.A.

Triesto—al kiu ? Eld. Slovenia Esperanto-Ligo (Eldona Sekcio), Milkošičeva 7/I, Ljubljana, Jugoslavujo. Sendota kontraŭ pago de la sendkosto, 1 rpk.

Kiel montras la titolo, ĉi tiu broŝuro pritraktas tre aktualan demandon. Ĝi prezentas la temon kun admirinda objektiveco, kaj indas legadon de ĉiu, kiu deziras kompreni la jugoslavan sintenon al problemo praktike, se ne teorie, ja malfacila. Kiel estas dirita en la broŝuro, "Ĉiu solvo, kiu pretendas esti definitiva kaj daŭra inter du kontraktantaj ŝtatoj, devas esti interkonsenta kaj ne altrudita" ; sed trovi bazon por kontentiga interkonsento estas la kerna malfacilo. La broŝuro mencias multajn sciindajn faktojn, historiajn kaj lastatempajn, kaj montras en klara kaj trafa maniero iliajn rilatojn al la nuna situacio.

Bedaŭrinde, mankas topografia mapo de la regiono, kaj la du statistikaj mapoj provizitaj (cetere anglalingvaj), kvankam interesaj, neniel anstataŭas ĝin. Okaze de represo de la broŝuro tia mapo espereble aldoniĝos. Plue, kelkaj lingvaj korektoj estos dezirindaj : *guvernero* kaj *guvernatoro* devus esti *gubernatoro*, *direkte* (p. 3) devus esti *rekte*, kaj la normala *roma* (aŭ *romana*) estus pli bona ol *romia*. Por *placigon* kaj *elanon*, preferindaj estu *merkaton* kaj *impeton* ; kaj sur paĝo 37 *preteksto* devus aperi anstataŭ *protekto*. Sen komento mi citas la jenajn kvazaŭ-teknikajn vortojn diversloke uzitajn : *agreso*, *demarkacia*, *demunti*, *diskriminacio*, *domicilon*, *ekspansiismo*, *optantoj*, *permanenta*, kaj *preventiva*.

Bernard Long.

***The Esperanto Teacher,** lernolibro por angle-parolantoj, de Mason Stuttard, licenciato de B.E.A. 108 paĝoj, eld. Esperanto Publishing Co. Ltd., prezo 2ŝ. 6p., afr. 2p.

Jen libro por studanto kiu deziras fari rapidan progreson. Stuttard klarigas la gramatikajn regulojn koncize kaj simple, kaj per abundaj traduk-ekzercoj provizas grandan stokon de vere utilaj kaj bonstilaj frazoj. Kutimiĝante al uzo de tiuj frazoj, la studanto jam de la komenco lernos la modernan, trafan lingvon, kiun uzas spertoriĉa profesia Esperantisto ; do espereble li evitos multajn el la anglismoj, kiujn uzas la normala angla studanto.

Tamen, foje la stilo de la angla lingvo en la libro ne plaĉis al mi, kaj mi ne povas aprobi la Esperantan frazon "Oni devas ekzerci la lingvon" (p. 23, l. 15). Stuttard mem uzas poste (p. 69) " . . . la studanto ekzercu *sin* . . . en la lingvo".

Mi trovis tri preserarojn : p. 13, l. 9 *apple* (devus esti *rose*) ; p. 23, l. 26 *ne* (*ni*) ; p. 94, l. 2 *illustr* (*ilustr*).

Preso, papero kaj ĝenerala aspekto bonaj.

W.A.G.

Prof. Edmond Privat :

Esperantistaj Legendoj

LEGENDOJ enhavas ofte poezian ĉarmon, sed oni tamen ne devas ilin konfuzi kun historio. En la intereso de la vero, mi petas permeson korekti du legendojn rilatajn al nia afero.

La unua rakontas, ke mi dekkvinjaraĝa piediris de Ĝenevo al Bulonjo-sur-Maro por la unua Kongreso en 1905. Malgraŭ la flata intenco de la Enciklopedio, kiu asertis tion, mi devas certigi ke malpli heroe, sed tute demokrate, mi veturis per triaklasa vagonaro. La bileton mi pagis per honorario por du artikoloj menditaj de ĉiutaga gazeto en Ĝenevo.

La dua rakontas pri "katastrofo" ĉe la Ligo de Nacioj. Ankaŭ tio estas fantazia. Jen la faktoj : En 1920 la franca delegito Hanotaux per elokventa parolado pri sia nacia lingvo petis la ĝeneralan kunvenon forigi de la tagordo la rezolucion de 10 membro-ŝtatoj pri Esperanto. Li sukcesis, sed en 1921 novan rezolucion ili prezentis, kaj tiun ĉi fojon, la kunveno decidis komisii la ĝeneralan sekretarion prezenti raporton pri Esperanto por 1922.

La raporto estis tiel favora, ke ĝin akre kontraŭbatalis la franca delegito Reynald, kaj lia brazila kolego Rio Branco, dum subtenis ĝin Prof. Gilbert Murray kaj S-ro Voionmaa, el Finnlando, ĉe kunsidoj de komisiono. Por ĝin akceptigi necesis konsenti je kompromiso : la komisiono do rekomendis la raporton, sed resendis la problemon pri instruado en lernejoj al la komisiono de intelekta kunlaborado, kiu estis aparta institucio, kiel UNESKO nun.

Post favora parolado de Lord Cecil, la 21an de septembro 1922, la ĝenerala kunveno aprobis la raporton kaj per 26 voĉoj kontraŭ 2 la inviton al la Intelekta Komisiono ekzameni la lernejan aferon. Lord Cecil diris, ke la favora raporto estas decida kuraĝigo al la esperantistoj, ke ili daŭrigu sian utilan laboron. Li rekomendis al la Intelekta Komisiono memori pri la bezonoj de la popolo, ne nur de universitatuloj.

Tion ĝi ne faris kaj, sen plua esploro de la afero, ĝi respondis, en 1923 post mallonga diskuto, ke ĝi ne opinias tasko sia rekomendi instruadon de artefarita lingvo sed nur de naciaj lingvoj, "malgraŭ la avantaĝoj de helpa mondlingvo". Ni sciis, ke la franca membro Bergson ricevis peton de sia registaro en tiu senco, kaj ni ne konsideris tion kiel katastrofon, ĉar la ĝenerala kunveno de la Ligo oficialigis sian raporton kaj ĝin disvendis amase. Neniam ĝi voĉdonis pri la respondo de la Intelekta Komisiono. Ni sciis, ke ni devis akcepti kompromison aŭ riski la rifuzon de la favora raporto ĉe la ĝenerala kunveno. Ni do preferis la kompromison : pli bone tion ol nenion. La esperantistaro ĝin proklamis tiutempe kiel grandan venkon, ankaŭ troe.

En 1924 la franca registaro ŝanĝiĝis kaj la ĉefministro Herriot deklaris sin preta helpi nin al plua paŝo kondiĉe, ke ni ne tuŝu la aferon pri lernejoj "tro delikata". Laŭ lia konsilo ni proponis oficialan rekonon de Esperanto kiel uzata helplingvo kaj la franca delegito nin subtenis ĉe la komisiono pri trafiko. Tiam la ĝenerala kunveno decidis peti la Interŝtatan Telegrafan Unuiĝon, ke

fino sur paĝo **85**

Enketo

pri Esperanto en sciencaj kaj fakaj gazetoj ne-esperantistaj

LA Centro de Esploro kaj Dokumentado, en kunlaboro kun ISAE, enketas pri la uzo kaj la ebloj uzi Esperanton en ne-esperantistaj fakaj (sciencaj kaj teknikaj) gazetoj. La rezulton de ĉi tiu enketo publikigos *Scienca Revuo*. La celo de ĉi tio estas duparta. Unuparte per tio ni informos la fakulojn en kiuj fakaj gazetoj ili eventuale povos esperantlingve publikigi la rezultojn de sia laboro, kaj aliparte la rezulto de ĉi tiu enketo povas esti plua argumento, plua armilo kiu helpos nin fari novajn konkerojn, armilo kiu eble povos utili jam en 1954 en Montevideo. Tial *rapida* laboro estas necesa. Ĉiuj kiuj povas kolekti kaj doni informojn, skribu al **D-ro W. P. Roelofs, Redaktoro de Scienca Revuo, Kerkpad zz 53, Soest, Nederlando.** Informu pri : plena nomo de la gazeto (eventuale kun traduko de la nomo), adreso de la redakcio, nomo kaj adreso de la eldonanto, fako(j) traktata(j), kategorio.

Ni dividas la gazetojn en diversajn kategoriojn, jene :

A : tiuj, kiuj jam publikigis artikolojn en Esperanto (se eble indiku ekzemplojn) ;

B : tiuj, kiuj jam aperigis nur resumojn en Esperanto (aldonitajn, aŭ ne, al alilingvaj artikoloj) (se eble indiku ekzemplojn) ;

C : tiuj, kiuj aldonas esperantlingvajn resumojn al ĉiuj alilingvaj artikoloj, prefere kun indiko depost kiam ili tion faras ;

D : tiuj, kiuj (ankaŭ) nun pretas akcepti artikolojn en Esperanto ;

E : tiuj, kiuj pretas allasi *nur* resumojn en Esperanto, aldonitajn al kiu-lingvaj* artikoloj ;

a : tiuj, kiuj postulas ke aŭtoroj estu ano de iu societo, instituto aŭ alia organizaĵo, kaj/aŭ abonanto de la koncerna gazeto ;

b : tiuj, kiuj ne faras tiajn postulojn.

Eblas do jenaj kategorioj : Aa, Ab, ACa, ACb, ADa, ADb, AEa, AEb, Ba, Bb, BCa, BCb, BDa, BDb, BEa, BEb, Ca, Cb, CDa, CDb, Da, Db, Ea, Eb.

* A=angla ; F=franca ; G=germana ; H=hispana ; I=itala ; J=japana ; P=portugala ; aliajn lingvojn indiku en klara maniero.

Ekzemplo : Koninklijke Nederlandse Akademie van Wetenschappen, Proceedings of the Section of Sciences; *Redakcia adreso :* Trippenhuis, Amsterdam, Nederlando ; *Eldonisto :* N. V. Noord-Hollandse Uitgevers-Maatschappij, N.Z. Voorburgwal 68-70, Amsterdam C ; UDK 5/6 ; B (**51** [1948], 154, 532, 792, 1221, 1231) E (A, F, G) b (membro de la akademio devas proponi akcepton de artikolo de eksterlandulo).

Klarigo : UDK 5/6 signifas ke la gazeto temas nur pri matematiko, naturscienco kaj tekniko, inklude medicinon.

Mi petas ĉies kunlaboron. Rapida helpo estas duobla helpo !

W. P. Roelofs.

Tra la Mondo Esperantista

Aŭstrujo

Je Pentekosto, la 5an ĝis 8a de junio 1954, okazos en Wien la Aŭstria Esperanto-Jubileo-Kongreso; ekestis en Aŭstrujo antaŭ 50 jaroj Esperanto-movado. Por festi ĉi tiun kongreson la poŝto eldonos novan Esperanto-poŝtmarkon kaj specialan koverton, kaj poŝtaĵoj povos esti stampataj per speciala Esperanto-poŝtstampo.

La protektoraton pri la aranĝoj transprenis la Federacia Prezidanto de Aŭstrujo, D-ro h.c. Generalo Theodor Körner. Aldone al ĉi tiu granda honorigo, ankaŭ aro da eminentuloj akceptis partopreni en la Honora Komitato.

En la programo de la kongreso estos tre diversaj eroj, inkluzive de la ĝeneralkunveno de A.E.F., fak-kunsidoj, festaj kaj amuzaj vesperoj, komunaj manĝoj kaj interesaj ekskursoj.

Informojn oni povas ricevi kontraŭ respondkupono de: Aŭstria Esperantista Federacio, Wien XV, Fünfhausgasse 16. Eksterlandanoj ne pagas kongresan kotizon!

Britujo

La Societo de Britaj Esperantistaj Instruistoj (S.B.E.T.) okazigis sian Jaran Konferencon la 31an de decembro kaj 1an de januaro 1954 en Londono, ĉe la College of Preceptors, kaj dum la Konferenco de Edukaj Asocioj, ĉe College of Distributive Trades.

Unu publika kunveno pritraktis la raporton de la Brita Esperantista Asocio por la Unesko-enketo, kaj aŭskultis informplenan paroladon de D-ro Lapenna pri la prezentado de la materialo kaj la sintenado de la diverslandaj registaroj. Aliaj publikaj kunvenoj temis pri "Ekzamenoj en Esperanto—internaj kaj eksteraj", kaj "Lastatempaj Elstaraj Libroj en Esperanto". Ĉi lasta kunveno estis en Esperanto. La enkondukа parolado estis farita de S-ro D. B. Gregor, M.A., la 1954-a prezidanto, kiu brile analizis la eldonaĵojn de la lastaj kvin jaroj. Sekvis la prezentado de individuaj libroj de diversaj personoj, kun vere instiga diskutado pri ĉiu libro. "Ripetinda okazaĵo!", oni diris.

Dum la Jarkunveno de membroj, la 1953-a prezidanto, S-ro Norman Williams, menciis, ke en lia lernejo en Denton, Manchester, 220 geknaboj lernas Esperanton, kaj 19 geinstru-istoj aŭ scias aŭ lernas la lingvon. La Sekretario raportis 202 membrojn, kaj multe da agado en diversaj kampoj.

Oni kore aprobis la iniciatemon de la Japanaj eldonistoj "Heibon-sya" en Tokio rilate la publikigon de "mondgeografio" verkita de infanoj por infanoj, kaj aktive subtenos ĝin.

La Somera Lernejo de S.B.E.T. okazos en Haverhill, Suffolk, de la 14a ĝis la 21a de aŭgusto 1954.

V. C. Nixon, Sekretario.

"Salutojn al la Universala Esperanto-Asocio, de la Meza Atlantika Oceano. Radio-oficiro C. D. Grimster. Ĉi tiu botelo ĵetiĝis en la oceanon aŭgusto 28/1953 en la loko 53-18 N 34-60 W, el la vaporŝipo *Caslon* survoje al Kanado".

Tiu noto, en ĝia botelo, estis trovita ĉe la marbordo en Buxa, Orkney-insuloj (Skotlando) la 16an de januaro 1954. La trovinto ĝin sendis al Brita Esperantista Asocio, kiu plusendis al ni. Plej diversaj estas niaj poŝtaĵoj . . .

Ĉeĥoslovakujo

En Bratislava, Slovakio, eldoniĝis lernolibro pri stenografio, uzota en superaj klasoj de komercaj lernejoj en Slovakio. Ĝia kovraĵo surhavas presitan la ekvivalenton de *Stenografio* en 16 lingvoj, inter ili Esperanto. La aŭtoro dediĉas specialajn artikolojn al la alfaroj de la oficiala ĉeĥoslovaka stenografio por fremdaj lingvoj, kaj mencias tiun por Esperanto, farita de Adolf Stanura ; ankaŭ la Esperanto-alfarojn de diversaj aliaj sistemoj.

Danlando

La komuna Konversacia Klubo (Randbølvej 4, F., Kopenhago) organizos en septembro 1954 tutmondan ekspozicion: "La poŝtmarkoj rakontas pri historio kaj geografio". Rilate al tiu ekspozicio okazos infan-konkurso, kun premioj por la gajnintoj kaj rekompenco por ĉiu partoprenanto. Detalojn petu geinstruistoj kaj gepatroj, ĉe la menciita adreso.

Germanujo

La instruado de Esperanto estas enkondukita en la Klemens-Aŭgust-Lernejo, Bonn, post parolado de la Prezidanto de la Esperanto-Grupo Bonn, UEA-delegito Ernst Kind. Jen la dua elementa lernejo en Bonn, kie oni instruas Esperanton.

Invitite de la Fervojista Esperanto-Grupo Fulda, 30 delegitoj de fervojistaj kaj aliaj Esperanto-grupoj en pluraj germanaj urboj kunvenis la 9an kaj 10an de januaro. Oni pasigis du tagojn en la Lother-Mai Kabano, novkonstruita libertempejo por fervojistoj, kaj diskutis pri diversaj gravaj, aktualaj problemoj pri la internacia lingvo. Vespere oni sin amuzis per kantoj k.t.p., ne malkuraĝigite de la akra vintra vetero kaj peniga montgrimpado en alta neĝo.

* * *

Oni bonvenigos gastojn el aliaj landoj ĉe la 50-jara jubilea festo de la Hamburga Esperanto-Grupo, la 1an de majo 1954. Detalojn pri la festo oni petu de : S-ro Heinrich Wielgus, Hamburg-Wilhelmsburg, Georg-Wilhelm-str. 38, Germanujo. Je la okazo de la festo la grupo en Hamburg eldonis tre belajn ilustritajn poŝtkartojn, kun teksto en Esperanto (haveblaj po 1 rpk.).

F-ino Frieda Christaller, delegitino en Stuttgart, kreis buston de nia Majstro. Dum la Zamenhofa Festo okazis la inaŭguro, ĉe kiu partoprenis eminentaj personoj, simpatiaj al nia movado.

Jugoslavujo

La Esperantista Societo "La Adriatika Stelo", Pula, organizis de la 29a de novembro 1953 ĝis la 6a de

decembro, Esperanto-semajnon, kun ekspozicio en la klubejo kaj diversaj propagandaj kunvenoj.

* * *

Kunlaboro de instruistoj, profesoroj, edukistoj kaj esperantistaj societoj estas petata je organizo de tutmonda ekspozicio de infandesegnaĵoj, kiu okazos en Zagreb honore al la Tutmonda Kongreso pri la Infanprizorgo. Plenajn detalojn sendos: Kroatia Esperanto-Ligo, Poŝtfako 213, Zagreb, Jugoslavujo.

Nederlando

La Nederlanda Grupo de Geinstruistoj Esperantistaj, sekcio de I.L.E.I., deziras organizi internacian konferencan semajnon post la Universala Kongreso en Haarlem, por geinstruistoj kaj ĉiuj, kiuj interesiĝas pri edukaj problemoj. Moderaj kostoj, agrabla intima restado en komforta ejo.

Se principe vi simpatias kun la plano, bv. sciigi tion al S-ro P. Korte, Schoolstraat 13, Veendam, Nederlando. La organizantoj volas scii, ĉu interesiĝas sufiĉe da personoj por certigi eventualan sukceson. Skribu tuj, por ke oni povu rezervi taŭgan ejon.

Alvoko de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

Ne ofte okazas tia granda kaj simpatia projekto, kia tiu de la japana firmo Heibon-sya, No. 4 Yomban-tyo (Kozimati), Tiyodi-ku, Tokio.

Ĝi estas la prezentado de la vivo de la infanoj de la mondo al la infanoj de Japanujo, pere de la verketoj de infanoj mem en ĉiuj landoj. Ili estas petataj priskribi sian hejmvivon, ludojn, amuzaĵojn, feriojn, legaĵojn, tutsimple kaj nature. Oni petas ankaŭ ilustraĵojn, ekzemple fotojn, desegnaĵojn, eĉ bildkartojn kondiĉe ke ĉiuj estas tre klaraj. Poemetoj kaj kantoj ankaŭ estas bonvenaj. Ĉio devas esti parto de la vivo mem, la hejmo, la ĉirkaŭaĵo; la infano elektu.

Ne necesas, ke la infanoj verku en Esperanto, sed estas dezirinde ke la verketoj estu tradukitaj en Esperanton, kaj ke oni klarigu Esperante iajn neordinarajn aludojn aŭ vortojn uzitajn.

La aĝoj de la infanoj, kies verketoj aperas en la specimena Japana libreto, eldonita Esperantlingve (havebla ĉe la supra adreso kontraŭ respondkupono) estas 7 ĝis 16 jaroj.

Jen elstara okazo por la helpo de geinstruistoj, kaj precipe por reprezentantoj de I.L.E.I. Mi forte esperas, ke ĉiu faros sian eblon sendi aŭ sendigi verketojn el diversaj partoj de sia lando—kamparo, marbordo, montaro, urbo. Ĉiu, kiu sendos, ricevos rekompencon. Poste, se eble, la volumoj aperos en Esperanto por la mondo.

Estas evidente, ke la redakta laboro estos grandega; do ni helpu rapide, kaj zorgu pri klara manskribado. Sendu noton pri aĝo, sekso, nomo kaj adreso de la koncerna infano, kun detaloj pri cirkonstancoj.

V. C. Nixon,
Prezidantino de I.L.E.I.

INTERNACIA FERIOSEMAJNO

en la norda parto de Germanujo de la 3a ĝis la 9a de Majo 1954

en Rendsburg, popolaltlernejo, ĉe la Nord-Ostsee-kanalo. Konversacia kaj perfektiga kursoj, interesaj prelegoj, ekskursoj en la belan landon inter la du maroj, k.t.p. Vizitontoj de la Hamburga Jubilea Festo, la 1an de Majo, venu al la proksima Rendsburg. Kostoj por plena pensiono kaj kurskotizo nur 60 gm. Bonvolu aliĝi antaŭ la 1a de Aprilo.

S-ro Hermann von Essen, Prinzenstr. 9, (24b) Rendsburg, Germanujo

39-a Universala Kongreso de Esperanto

Poŝtfako 140, Haarlem, Nederlando

31-an julion—7-a aŭguston 1954

N-ro 5 **OFICIALA KOMUNIKO** **Februaro 1954**

Pagoj : Haarlem. Rotterdamsche Bank, Poŝtĝirkonto 604997. L.K.K. akceptas nur pagilojn ŝanĝeblajn en banko. Ĝi absolute ne povas akcepti varojn aŭ librojn kiel pagon. Nepre sendu la pagon kaj la aliĝilon al la sama instanco, ĉu al L.K.K., ĉu al peranto.

Dua Bulteno : Jam estas sendita al ĉiu aliĝinto. Ĝi ne estas por ĝenerala disdono, tial bonvolu ne peti kvantojn.

Mendoj : Kun la Dua Bulteno estas instrukcioj pri mendoj kaj Oficialaj Mendiloj. L.K.K. atentigas, ke ĝi ne traktos mendojn sen tiuj oficialaj dokumentoj, kiuj estas parto de la administra sistemo.

Honora Protektanto : La L.K.K. havas la honoron kaj plezuron sciigi, ke akceptis esti Honora Protektanto de la 39-a Universala Kongreso de Esperanto D-ro Willem Drees, Ministro-Prezidanto de Nederlando.

Arta Vespero : La komunumo de Haarlem esprimis sian intencon aranĝi por la kongresanaro grandiozan koncerton de muziko (orgeno kaj solistoj) en la Granda Preĝejo de S-ta Bavo en unu vespero de la kongresa semajno.

Teatra Vespero : La L.K.K. anoncas, ke ĝi aranĝis prezenton de teatraĵo en Esperanto. Rolos profesiaj aktoroj kiuj tiucele studas la lingvon. La prezento okazos en tri sinsekvaj vesperoj en la Urba Teatro de Haarlem.

Parolfilmo : La Ministerio por Eksterlandaj Aferoj entreprenas filmon en Esperanto "Lando kaj Popolo", kiun ĝi disponigos por uzo dum kaj post la kongreso.

Limdato/Limcifero : Sekve de la eksterordinare granda aliĝo de kongresanoj en ĉi tiu frua stadio la L.K.K. denove avertas pri la fakto ke la partopreno estas limigita je ĉ. 2000 kongresanoj. Estas tre verŝajne, ke tiu cifero estos atingita tre baldaŭ. Cetere L.K.K. ne akceptos aliĝojn post la fino de junio. Por eviti ĉagrenon nepre aliĝu jam tuj !

Statistiko : (ĝis fino de jan.) : Aŭstrujo 12, Belgujo 40, Brazilo 3, Britujo 218, Danujo 33, Finnlando 25, Francujo 178, Germanujo 120, Hispanujo 5, Indonezio 1, Italujo 50, Japanujo 1, Jugoslavujo 50, Kanado 4, Madejro 1, Meksikio 2, Nederlando 437, Norvegujo 50, Novzelando 9, Portugalujo 5, Svedujo 130, Svislando 17, Turkujo 2, Usono 7. Sumo el 24 landoj 1400 (pasintjare 708).

Mason Stuttard,
Konstanta Kongresa Sekretario.

Joh. D. Spaling :

Haarlem, centro de pentrista arto

Muzeo Frans Hals

SUDE de Haarlem en anekso de la urba parko staras monumento je la memoro de Frans Hals (1584–1666) la mondfama pentristo, kiu por Haarlem havas la saman signifon, kian havas Rembrandt por Amsterdam.

Pinakoteko ne estas kompleta se ĝi ne posedas verkojn de Frans Hals. Feliĉe por la urbo, kie li vivis kaj laboris, ne ĉiuj pentraĵoj de Hals iris al la eksterlandaj kaj eksterurbaj muzeoj.

En bela konstruaĵo de la 17-a jarcento en la mezo de la urbo troviĝas la Frans Hals-Muzeo, origine konstruita kiel hejmo por maljunaj viroj. Oni ankoraŭ nun en la korto sentas sferon de ripozo, bona kondiĉo por trankvila rigardado de la majstro-verkoj. La ĉefaj estas grandaj komponaĵoj, ŝprucantaj je kolor-pompo, tamen tre distingitaj. Ili enbildigas celpafistarojn de la gildoj kaj estraranojn de filantropaj fondaĵoj.

Inter la lastenomitaj unu pentraĵo tre surprize reprezentas la Estraron de la Hospitalo de Sankta Elizabeto. Estas nur unu pentraĵo samspeca, kiu superas ĝin en brilo, nome "La Mastroj de la Ŝtofaj Ekzemploj", kiun Rembrandt kreis 20 jarojn poste. La plej frue datita verkaĵo estas el 1616, sekve farita post la 30-jara aĝo de la majstro. Ĝi enbildigas la "Manĝon de la Oficiroj de la Pafejo de Sankta Georgo". El ĉi tiu tolaĵo parolas artisto konscia de siaj forto kaj certo. Belege pentritaj estas la brokadaj kusenoj kaj damaska tablotuko.

En 1627 Hals ricevis du grandajn komisiojn : Bankedoj de la Oficiroj de la Pafejo de l'Kolbistoj kaj de Sankta Johano. Ili donas maksimumon de vivoĝojo. Oni sentas sin kvazaŭ inter la frandantaj pafistoj. La ĉirkaŭaĵo ricevis malmulte da atento kaj fariĝis nur subordigita afero. Muroj kaj kurtenoj estas nur

supraĵe indikitaj. La portreto tiel akiras elstaran personecon.

Kiam oni rigardas tiujn pentraĵojn oni emas konkludi, ke la verkinto, kiu jam dum sia vivo havis reputacion, vivis en tre bonaj cirkonstancoj. La vero estas, ke la artisto neniam sukcesis resti senŝulda. Ofte li eĉ devis transloĝi pro sia nekapablo pagi la luon de sia domo.

Strange estas ke oni malmulte scias pri la vivo de Hals antaŭ ol li en Haarlem en la aĝo de proksimume 30 jaroj fariĝis mezo de pentrista vivo.

La nombro de liaj verkoj estas granda kaj ili venis en la manojn de tre diversspecaj homoj ; ofte tial ke Hals devis cedi pentraĵojn por garantii la pagon de bezonaĵoj. Li ne estis lerta el ekonomia vidpunkto ĉar li vivis laŭ liberartista maniero sen zorgoj por alia tago ol la estanta.



Korto de la Muzeo Frans Hals

Ke li tamen de tempo al tempo montris komercistan talenton pruvas la fakto, ke li en aŭkcio aĉetis pentraĵon de Hendrick Goltzius por fl. 90.– kaj vendis ĝin por fl. 200.– al la urbestraro. Ĝi nun apartenas al la kolekto de la Frans Hals-Muzeo.

Hals atingis altan aĝon sed restis laborkapabla. En sia 78-a jaro li devis peti subtenon de la urba registaro, kiu asignis al li fl. 200.– jare.

Du jarojn poste li ricevis ankoraŭ komisiojn por grandaj estrarbildoj. En admirinda maniero li kapablis montri en tiuj lastaj du pentraĵoj de la Estraranoj kaj Estraraninoj de la Hejmo por Maljunaj Viroj plej altan teknikon.

En 1666 Frans Hals mortis, postlasante vidvinon en bezonaj cirkonstancoj. En la Bavo-Preĝejo sur la Granda Placo oni trovas lian tombon kun granda memorŝtono.

Ankaŭ en la nuna tempo Haarlem ankoraŭ estas centro de pentrista vivo. Kelkaj konataj majstroj edukadas lernantojn. Inter ili la nestoro H. F. Boot okupas unuan lokon. En la Muzeo Van Looy, kie konstante estas videblaj la verkoj de la pentristo Jac. Van Looy, oni ofte aranĝas ekspoziciojn de nuntempaj pentristoj.

Tradukita de H. J. Blokker.

HELSINGÖR

17-24 de julio 1954

okazos en la Internacia Altlernejo internaciaj feriaj Esp-kursoj : daŭriga, konversacia, prepara por Esp-instruontoj (Cseh kaj lernolibra metodoj), por Esp-gvidantoj kaj por infanoj. Prospekto senpage havebla ĉe

L. Friis,

Ingemannsvej 9, Aabyhøj, Danlando

Post la kurso aŭtobusa karavano al Haarlem

M. de Waard :

La Ventmueliloj en Nederlando

TUJ kiam en 1954 la vizitontoj de la Universala Kongreso transiros la limojn de Nederlando ili ekvidos tipe nederlandajn konstruaĵojn : la ventmuelilojn. Precipe tiuj, kiuj alvenos per aeroplano (kaj tio estas tre rekomendinda vojaĝmaniero) estos ĉarmitaj de la idilia situacio de tia muelilo meze de la verde verda surfaco de la malalta lando. Gaje turniĝantaj muelilaj brakoj, fiksitaj sur gracilaj dometoj, starantaj en verda ebenaĵo, geometrie dividita per arĝentaj rubandoj (la kanalaro !), kvazaŭ mansvinge bonvenigas la aerovojaĝantojn.

Sed ankaŭ tiuj, kiuj veturas "nur" sur la tero, per trajno aŭ per aŭtomobilo, jam baldaŭ post la doganistoj konatiĝas kun la ventmueliloj ; ili estas la fabrikmarko de Nederlando.

Ofte eksterlandanoj esprimas la opinion, ke la nederlandanoj konservas tiujn konstruaĵojn nur por plaĉi al la turistoj, por elpoŝigi iliajn dolarojn. Nenio estas malpli vera ! Precipe en la lasta jaro de la milito (1944–45) tiuj kvazaŭ prahistoriaj mueliloj klare montris sian grandan valoron ; pro manko de elektro multaj regionoj inundiĝis, sed tie, kie oni ne malkonstruis la ventmuelilojn la ebleco elpumpi la akvon restis, danke al la vento, kiu blovas en Nederlando preskaŭ ĉiun tagon.

Se oni povus vidi per unu rigardo tutan Nederlandon el aeroplano oni konstatus, ke la mueliloj estas disvastigitaj sammezure tra la tuta lando ; do ili staras ne nur en la malaltaj regionoj de la okcidento kaj nordo, sed ankaŭ en la pli senakvaj, pli altaj provincoj de la sudo kaj oriento. Tirante linion de la sud-okcidento al la nord-oriento oni farus

ĝustan dividon de la tipoj : maldekstre de tiu imagita linio troviĝas la akvomueliloj, dekstre la industriaj mueliloj, kiuj muelas grenon aŭ subtenas fabrikejojn de papero, oleo, spicaĵoj, lignosegejojn k.t.p.

Precipe la akvomueliloj havas bazan gravecon por la ekzistado de Nederlando ; ili ja servas ne nur por senakvigi lagojn kaj aliajn akvejojn, sed ili prizorgas ankaŭ la konstantan reguladon de la akvonivelo en la polderaj regionoj. En tempo de multa pluvado ili pumpas la superfluan akvon el la komplika kanala sistemo (la vejnoj de la polderoj) en la liberan riveron. En tempo de longa sekeco ili enpumpas akvon en la reton de polderaj akvovojoj por maldreni (irigacii) la kampojn kaj subteni la fekundecon de la grundoj.

La moderna tekniko ĉi tie estis granda malamiko de niaj ventmueliloj ; simpla motoro ja faras la laboron multe pli senriske kaj multe pli regule ol la "natura" muelilo, kiu ja tute dependas de la nekonstanta forto de la vento. Tial en la lastaj kvindek jaroj detruiĝis multaj mueliloj, pro kio malriĉiĝis la pejzaĝo. Senpoeziaj polderaj estraroj kruele malkonstruis kelkcentjarajn muelilojn, anstataŭigante ilin per senstila pumpejo. La danĝero de la malkonstruo fariĝis tiel minaca kaj la perdo de kulturaj valoroj tiel sentebla, ke oni fondis asocion por protektado de mueliloj. La sorto volis, ke ĝuste tiuj polderoj, kies neprogresema estraro konservis la antikvan muelilon, povis resti funkciantaj en la senelektra lasta periodo de la milito.

* * *

La polderaj mueliloj staras plej ofte izolitaj en la regiono aŭ—se la poldero estas tre profunda—en serio unu post la alia, pumpante supren la akvon laŭ etaĝoj. Ili do libere povas kapti la venton, kies vojo estas neniel barata. La kapo de la konstruaĵo, sur kiu estas fiksita la braka kruco, estas turnebla "kontraŭ la vento" per speciala mekanismo.

La situacio de la industriaj mueliloj estas tute alia. En pli frua periodo



ĉiu urbo, ĉiu vilaĝo, sin mem respektanta, havis sian propran muelilon, pli ĝuste muelejon, kie oni muelis la grenon, produktis paperon aŭ flegis alian industrion. Tiuj konstruaĵoj estas multe pli altaj ol la polderaj mueliloj, ĉar ili ja devas kapti la venton super la tegmentoj de la ĉirkaŭanta domaro. Se la urbo havis remparon, tio estis preferata loko por konstrui muelejon. Speciala parto de la juro regulis la t.n. ventrajton. La posedanto de la muelejo havis la privilegion uzi la venton. En areo sufiĉe vasta neniu havis rajton konstrui ion ajn super certa alteco aŭ kreskigi arbojn, por ne ĝeni la vojon de la vento. Jam la feŭdaj nobeloj, preskaŭ same ruzaj rilate al la impostado kiel moderna financministro, sciis farmi la venton, cetere ne produktitan de ili, al la muelistoj, igante ilin pagi belan sumon !

* * *

La veremo postulas konfesi tie ĉi, ke la ideo eluzi la forton de la vento ne estas inventaĵo nederlanda. Verŝajne la origino de la mueliloj devenas el Persujo aŭ Arabujo, sed la nederlandanoj perfektigis la instrumenton en la daŭro de sep jarcentoj. Fakte jam dum longa periodo ne plu ŝanĝiĝis la diversaj tipoj. Nur en la lastaj jardekoj la moderna scienco iom aliigis la formon de la brakoj, danke al la teorio de la "fluanta linio". La rezisto de la aero malpliiĝis tiamaniere dum la funkciado.

En la nuna momento Nederlando posedas ankoraŭ ĉ. 700 polderajn muelilojn kaj ĉ. 1050 industriajn. El tiuj 1750 proksimume 1300 havas ankoraŭ aktivan taskon, la ceteraj estas aŭ duone kadukaj aŭ estas kulturmonumentoj. La estetika



elemento de ventmuelilo estiĝis el si mem, aŭ, pli ĝuste, kreiĝis el la bezonoj de la tekniko. La ekstera formo estas do pure *funkcionalisma* (=kreita el la bezonoj, sen superfluaj ornamaĵoj). Estas tiu naiva, natura konturo, tiu senartifika ĉarmo, kiu ravis en ĉiu jarcento la artistojn, desegnistojn kaj pentristojn. Sennombraj estas la desegnaĵoj aŭ pentraĵoj, sur kiuj ventmueliloj figuras. Rembrandt mem faris multajn tiajn desegnaĵojn.

* * *

La ventmueliloj diferencas inter si ne nur laŭ grandeco, sed ankaŭ laŭ tipo, konstrumaterialo kaj laŭ la principo de la mekanismo. Ekzistas tipoj tre malgrandaj, kies tuta korpo turniĝas ĉirkaŭ vertikala akso. Ili estas konstruitaj nur el ligno. Sed ekzistas ankaŭ tre grandaj mueliloj, parte el brikoj, parte el tabuloj, kovritaj per pajlo. Ilia korpo estas

ronda aŭ ok-angula kaj la kapo turniĝas super la mueleja korpo. En tiu kapo (=la tegmento) troviĝas horizontala akso, sur kiu la kvar brakoj estas fiksitaj. Per helpo de ligna fostaro kaj granda rado la muelisto metas tian muelilon "kontraŭ la vento" (vidu unu el la fotoj). En alia speco (plejofte la industriaj mueliloj) la mekanismo, per kiu oni metas la brakojn kontraŭ la vento, troviĝas en la korpo de la muelilo mem, sekve ĝi ne estas videbla de ekstere.

La grandaj muelejoj servas samtempe kiel loĝejo de la muelisto. En antaŭaj jarcentoj la muelisto estis ĉiam grava persono en la vilaĝa socio.

En la nederlanda lingvo la idiomo posedas multajn esprimojn pri muelistoj kaj mueliloj. "Li ricevis frapon de muelilo" signifas "li estas iom idiota". Alia esprimo: "Tio estas greno por lia muelilo" signifas "Tio estas laŭ lia plaĉo". Pri tiu, kiu atingis altan oficon kaj pro tio suferas multan kritikon oni diras "Altaj mueliloj kaptas multan venton".

* * *

En la historio de Nederlando la mueliloj ludis gravan rolon en la batalo kontraŭ la akvo. En la ora epoko de nia historio (la 17a jarcento) sennombraj pli aŭ malpli grandaj lagoj estis senakvigitaj pere de la ventmueliloj, kiuj tiamaniere grave kontribuis al la pligrandigo de nia fruktodona teritorio . . . en paca maniero. Por doni maldetalan komprenon pri tia luktado kontraŭ la akvo sekvas tie ĉi mallonga priskribo pri la sekigo de la lago "Schermer" en la provinco Norda Holando. Dum kvar jaroj de peza laboro (1631–1635) oni sukcesis konstrui digon ĉirkaŭ la tuta lago, do fermi ĝin, kaj elpumpi la akvon. Ĉio ĉi fariĝis laŭ la plano de fama inĝeniero *Leeghwater*. La surfaco estis 4745 hektaroj, dividitaj en 14 sekcioj de po 330 hektaroj. Ĉiu sekcio disponis pri poldera muelilo. Ĉiu muelilo pumpis la akvon de sia sekcio en centran basenon, kiu provizore konservis ĝin. Sur tri lokoj de la ferma digo la kolektita akvo estis pumpita ekster la polderon helpe de sistemo de 36 mueliloj. Ĉiu muelilo de tiu ĉi armeo pumpis la akvon al pli alta ŝtupo, ĝis kiam la tuta ĉeno de mueliloj fine sekigis la tutan regionon.

Ne ĉiam estas eble, ke poldero ellasas sian superfluan akvon rekte en riveron, kiu siavice fluigas ĝin en la maron. Ne, ofte oni transportas sian akvon en alian, najbaran polderon, kaŭzante, ke tiu nun ricevas tro multe. La najbaro devas posedi du muelilojn pli fortajn por pumpi siavice la akvon en riveron (aŭ



fino sur paĝo 85

Tibor Sekelj :

Vojaĝspertoj de vojaĝanta komitatano

LA lastajn jarojn mi pasigis vojaĝante tra diversaj amerikaj landoj kaj farante klopodojn por starigi Esperanto-Movadon tie, kie ĝi ankoraŭ ne ekzistis, kaj plifortigi ĝin tie, kie ĝi jam ekzistas, farante tion ĉi lastan, kompreneble, en harmonio kaj en kadro de la landa esperantistaro. Jam plurfoje mi ricevis demandon pri tio, kiel mi sukcesas vojaĝadi, de kie mi prenas la monrimedojn, kaj kio estas mia agadmaniero por atingi relative bonajn rezultojn en la "prilaborataj" landoj. Kaj jen mi faros kelkajn klarigojn pri tio, espereble, ke ankaŭ aliaj povos profiti miajn spertojn.

Kiam mi alvenas en iu lando, kie ne ekzistas esperantistoj, unue mi vizitas la ĉefajn ĵurnalojn, por saluti iliajn direktorojn, kiel kolegojn, ĉar mi mem estas ĵurnalisto. Preterpasante, mi montras kelkajn el miaj verkoj, ĉefe pri esplorvojaĝoj miaj. Tio entuziasmigas la direktorojn, kaj ili ordonas al raportisto intervjui min, el kio rezultas raporto pri mia alveno en ĉiuj ĵurnaloj, ornamitaj per allogaj fotoj. Kompreneble, en ĉiu el ili aperas almenaŭ kelkaj vortoj pri Esperanto. Poste ĉiam aperas ĵurnalistoj malfruiĝintaj, kiuj volas havi ion "kion aliaj ĵurnaloj ankoraŭ ne diris". Kompreneble, ke mi gardis ion specialan por ili : sensacian intervjuon pri la problemo de la internacia lingvo. En tiuj kazoj mi kutimas proponi min por tralegi la intervjuon antaŭ la publikigo, por korekti erarojn.

La tuja efiko de tiuj intervjuoj estas, ke post kelkaj tagoj mi estas ĝenerale konata en la ĉefurbo, kaj kie ajn mi aperas, jen mi ne bezonas prezentadon. Kaj tiam mi komencas aperadi. Mi vizitas la rektoron de la universitato kaj la edukministron, por proponi prelegojn en diversgradaj lernejoj, kaj la samon mi faras en aliaj klerigaj institucioj. Ĝenerale mi proponas fari tri prelegojn : unu pri montgrimpado, kun projekcio de filmo ; unu pri ekspedicio tra Amazonio, kun lumbildoj ; kaj inter ili, unu pri la problemo de la internacia lingvo. Tiel mi certigis al mi aŭskultantaron, ĉar la aliaj du temoj facile altiras la publikon. Sendube, unue mi devas konvinki la rektoron aŭ alian estron pri la graveco de la priesperanta parolado, kaj se li estas malfacile konvinkebla, mia fina argumento estas la elmontro de deko da presitaj programoj el alilandaj universitatoj, el kiuj evidentiĝas, ke ankaŭ aliloke mi faris la samon. Tiu argumento ne maltrafas la celon. Kompreneble, ĉiuj prelegoj estas pagataj.

La institucio kiu aŭspicas la prelegojn, kutime faras sufiĉan propagandon. Sed por tiu, kiu temas pri Esperanto, krom tio mi kutime verkas kelkajn mallongajn artikolojn, malsaman por ĉiu ĵurnalo, kaj persone vizitas la redaktejojn por peti ilian publikigon.

Antaŭ la parolado mi proponas al la rektoro aŭ lernejestro ke, se estus aro da personoj interesitaj pri la lernado de Esperanto, mi volonte gvidus senpagan kurson en ejo, kiun li disponigus. Kaj senescepte li disponigas ĝin. Dum la parolado mi klopodas konigi ĉiujn argumentojn favorajn al la Internacia Lingvo sed

klopodas, ke ĝi enhavu ankaŭ sufiĉe da bonhumoro, kaj ne tedu la aŭdantaron. Laŭ mia ĝenerala sperto, kiam fine de la prelego mi demandas : "Ĉu hazarde estas iu, kiu ŝatus lerni Esperanton, se malfermiĝus kurso ?", 50% de la aŭdantaro levas la manojn. Tiam tuj mi donas la tagon kaj horon por komenci la kurson.

Se eble, tion mi ripetas en du aŭ tri malsamaj lokoj, kaj tiel komencas tri kursojn, kun eble cento da lernantoj entute, kiu post unu monato malgrandiĝas al la duono, kaj post du monatoj jam ne plu ol 30 gelernantoj partoprenas la kurson. Tiam estas la momento por fondi societon, kaj krom la klasoj ni faras semajnan kunvenon por paroli pri la movado kaj pri organizaj aferoj. Ankaŭ mi instigas ekskursojn kaj te-vesperojn, por ke la membroj havu okazon amikiĝi. Ankaŭ la eventualaj tri kursoj tiam kuniĝas en unusolan.

Se mi plilongigas mian restadon en la lando, aŭ se mi trovas iun personon kapablan por gvidi novan kurson, post tri monatoj mi entreprenas novan kampanjon pere de la gazetaro kaj novaj prelegoj, kiuj nepre rezultigas novan kurson, ĉar intertempe jam multaj personoj eksciis pri Esperanto, sed bedaŭras ke la kurso jam estas tro progresinta por eniri en ĝin.

Kaj el kio mi vivtenas min dum tiu tempo ? Ne, mi ne estas milionulo, nek havas iun ajn renton. Unu el miaj ĉefaj enspezoj estas la prelegoj. Post la ĉefurbo mi klopodas organizi kelkajn en duarangaj urboj, kaj samtempe profitas la okazon por ekkoni la landon. Mi havas preparitan serion de cent artikoloj ĵurnalistaj, el kiuj mi vendas kvanton al diversaj ĵurnaloj en ĉiuj landoj, kaj ankaŭ miaj libroj eldonitaj en diversaj landoj surprizas min kelkfoje per modesta ĉeko. Antaŭ du jaroj mi aldonis al mia laborprogramo internacian ekspozicion de infandesegnaĵoj, kiun mi kunigis pere de Esperanto, kaj kiun mi prezentis en kvar landoj ĉiam aŭspicita kaj pagita de la edukministerio de la koncerna lando. Tiun ekspozicion mi akompanas per prelego speciala por instruistoj pri la "Psiĥologio de la infandesegno kaj ĝia aplikado en la moderna pedagogio." En kelkaj landoj oni igis min ripeti diversfoje tiun paroladon. En kelkaj landoj mi prezentis ankaŭ reklamideojn kaj radio-programojn. Kaj ĉio ĉi estas sufiĉa por miaj elspezoj, kiuj kelkfoje estas pli altaj ol la normalaj, pro la vojaĝado kaj vivado en hoteloj.

Pro la naturo mem de tia vivmaniero, mi ne devas restadi en iu lando pli ol kelkajn monatojn. Kaj tiam, vole nevole, mi devas forlasi la ĵusnaskitan Movadon, kiu kelkfoje estas vivokapabla, kaj alifoje ankoraŭ forte bezonas vartistinon. Se en tiaj kazoj mi havas helpanton, por lasi lin tie ankoraŭ dum kelkaj monatoj, certe la frukto de la laboro estas pli sekura kaj pli daŭra. Sed bedaŭrinde, ne ĉiam troviĝas tia persono. Kelkaj eŭropaj samideanoj sin proponis en iuj kazoj alveni al tiuj landoj, sed ĉiam ekzistis iu malfacilaĵo : aŭ ili havis malfacilaĵon kun la enirpermeso, aŭ kun la elspezoj, kaj tiuj malgrandaj grupoj ne povas certigi la vivtenadon de persono, kies kvalitojn oni cetere eĉ ne konas.

Laŭ la cirkonstancoj mi havis specialajn kunvenojn kun la UNESKO-komisiono, kun ministroj de edukado kaj de eksteraj aferoj kaj sciencistoj por paroli pri Esperanto, kaj laste, en Meksikio mi prezentis pri tio tezon en Sociologia Kongreso.

En lokoj, kie ekzistas Esperantistoj, mi klopodas ne tro profiti ilian gastamon kaj servojn, sed kontraŭe, mi enskribiĝas en la Asocion kiel aktiva membro. Miajn eksteresperantistojn aferojn mi mem aranĝas, ne ĝenante la samideanojn.

Nun mi troviĝas en Meksikio, kie la cirkonstancoj estas multe pli favoraj. Deko da personoj bone parolas la lingvon, kaj dudeko apartenas al la Asocio. Nun ni planumas novan agadon, pli energian, por—se eble—dekobligi tiun kvanton dum tiu ĉi jaro. Antaŭ ol mi alvenis ĉi tien, mia agadkampo estis en la lastaj 14 jaroj Argentino, Bolivio, Venezuelo, Gvatemalo, Nikaragvo, Salvadoro, Honduraso kaj Kostariko. Kun escepto de du el ili, ĉie mi plugis virgan grundon. Ĉie nun ekzistas Asocioj. Sed por ke ili povu daŭre funkcii sen malfacilaĵoj, nepre estus necese, ke iu okupadu mian lokon en tiuj landoj, laŭ difinita organiza plano, proksimume kiel mi tion proponis en iu projekto pri "speciala senditaro".

Ankoraŭ multo estas farenda en tiuj ĉi amerikaj landoj, kaj mi invitas la personojn, kiuj povas tion fari, ekpreni la fadenon tie, kie mi ĝin lasis, en tiu aŭ jena lando.

Dume mi daŭrigos mian migradon, serĉante novan grundon. Kien? Ankoraŭ mi ne scias. En "Heroldo" mi vidis insinuon pri tio, ke mia laboro povus esti utila en Hindujo, kaj aliaj landoj sudaziaj, kaj al mi ne malplaĉas la ideo. Sed lasu min ankoraŭ pripensi la aferon.

★ ★ ★

Esperantistaj Legendoj : *fino*

ĝi rekonu Esperanton kiel uzatan lingvon en internaciaj rilatoj kaj akceptu ĝin apud la nacilingvoj por telegramoj "klaraj" anstataŭ pagi la tarifon de "kodoj".

Tiun peton akceptis la Interŝtata Unuiĝo en Parizo dum la posta vintro, kaj ŝanĝis sian statuton por enmeti Esperanton en artikolon 7an pri la rekonataj lingvoj. Jen la faktoj : ili helpos nin resti modestaj, sed firmaj, en nia nuna klopodo ĉe UNESKO, kaj ne postuli tuj la lunon. Ankaŭ tie necesos akcepti kompromison pro la kontraŭstaroj, jam potencaj. Ĉefe gravas la rekono, ke Esperanto ekzistas, vivas kaj helpas formi tutmondan konscion. Se fieraj registaroj ne deziras tion helpi, tio estas ilia respondeco, ne la nia.

La Ventmueliloj : *fino*

eventuale en alian najbaran polderon). Oni komprenas, ke la subteno de la ekvilibro en la "akva mastrumado" bezonas rigorajn regulojn. Ne validas la devizo "min ne ĝenas najbara mizero." Eĉ kontraŭe, la batalo kontraŭ la pramalamiko—la akvo—estas ĉies afero. Tial tuta leĝaro kaj administracia sistemo de polderaj, distriktaj kaj regionaj estraroj regulas ĉies taskon. Por ni ĉiuj en Nederlando validas la devizo en la blazono de la provinco Zeeland : *luctor et emergo*, libere tradukita : "Mi luktas, sed revenas el la ondoj". La batalo kontraŭ la akvo estas senĉesa luktado. Ofte tutaj regionoj subakviĝis, sed preskaŭ ĉiam la tero revenis el la ondoj. En tiu batalo grava armilo estas la ventmuelilo, ĝi estas do ne nur plaĉa viktimo por turista fotografilo . . .

La fotojn en ĉi tiu artikolo pruntis la Ŝtata Informa Servo Nederlanda.

Nia Membraro

EN marto 1953 ni donis la statistikon pri la membraro de nia Asocio je la fino de 1952. Konforme al petoj ricevitaj ni nun donas similan statistikon pri la membraro je la fino de la ĵus pasinta jaro. Tiuj, kiuj havas intereson pri tiaj aferoj certe volonte komparos la ciferojn pri la propra lando, kaj certe ĉiu estos kontenta vidi ke malgraŭ malfacilaĵoj la membrostato denove pliboniĝis je pli ol 800 membroj.

Membroj de U.E.A. je la 31a de Decembro 1953

	AM	MJ	MA	MS	Pat.	DM	HM	Sumo
Acoroj	—	—	4	—	—	—	—	4
Alĝerio	—	1	5	—	—	—	—	6
Angolo	—	—	3	3	—	—	—	6
Argentino ..	300	—	60	4	—	3	—	367
Aŭstralio ..	80	3	70	11	1	11	—	176
Aŭstrujo ..	—	21	64	9	—	1	2	97
Belgujo	572	21	136	17	1	5	1	753
Bermudo ..	—	—	1	—	—	—	—	1
Borneo	—	—	—	—	—	1	—	1
Brazilo	1745	95	303	75	—	21	1	2240
Britujo	770	158	578	133	3	73	4	1719
Bulgarujo ..	—	—	2	—	—	1	1	4
Cejlono	—	—	1	—	—	1	—	2
Cipro	—	—	1	—	—	—	—	1
Ĉeĥoslovakujo ..	—	—	25	—	—	3	6	34
Ĉilio	—	—	2	—	—	—	—	2
Ĉinujo	—	—	1	—	—	1	—	2
Danujo	1020	33	112	11	—	2	1	1179
Egiptujo ..	—	5	8	—	—	2	—	15
Finnlando ..	—	49	182	—	—	1	1	233
Fr. Ekv. Afriko ..	—	—	—	2	—	—	—	2
Fr. Okc. Afriko ..	—	1	—	—	—	—	—	1
Francujo ..	939	72	382	36	—	17	10	1456
Germanujo ..	—	51	253	56	—	9	2	371
Grekujo	—	—	9	—	—	—	1	10
Gvatemalo ..	—	—	5	—	—	—	—	5
Hindoĉinujo ..	—	1	—	—	—	—	—	1
Hindujo ..	—	1	1	—	—	—	—	2
Hispanujo ..	381	16	99	11	—	5	1	513
Honduraso ..	—	—	1	—	—	—	—	1
Hungarujo ..	—	—	3	—	—	—	3	6
Indonezio ..	—	—	2	—	—	—	—	2
Irako	—	1	1	—	—	—	—	2
Irano	—	—	—	—	—	2	—	2
Irlando	—	12	11	1	—	—	—	24
Islando	—	1	35	1	—	3	—	40
Italujo	1000	29	162	12	—	3	1	1207
Izraelo	—	1	10	—	—	1	—	12
Japanujo ..	—	12	81	—	—	—	1	94
Jugoslavujo ..	748	14	72	7	—	2	1	844
Kanado	—	—	16	6	—	3	—	25
Kanariaj Insuloj ..	—	—	4	1	—	1	—	6
Kenjo	—	1	1	1	—	1	—	4
Kongo	—	—	2	1	—	—	—	3
Koreo	—	—	1	—	—	—	—	1
Kosta Riko ..	—	—	1	—	—	—	—	1

	AM	MJ	MA	MS	Pat.	DM	HM	Sumo
Kubo	—	—	19	1	—	1	—	21
Libano	—	2	—	1	—	—	—	3
Libio	—	—	8	—	—	—	—	8
Liĥtenstejno ..	—	—	1	—	—	—	—	1
Luksemburgo ..	—	—	2	—	—	—	—	2
Madagaskaro ..	—	—	4	—	—	—	—	4
Madejro.. ..	—	—	3	1	—	—	—	4
Malajo	—	—	—	1	—	—	—	1
Maroko	—	25	23	25	—	4	1	78
Meksikio ..	—	—	4	—	—	—	—	4
Nederlando ..	664	72	325	22	1	7	5	1096
Nigerio	—	—	1	—	—	—	—	1
Nikaragvo ..	—	—	4	—	—	—	—	4
Norvegujo ..	777	26	104	25	—	6	1	939
Nova Kaledonio ..	—	—	1	—	—	—	—	1
Nov-Zelando ..	201	15	47	6	—	7	—	276
Peruo	—	—	1	—	—	—	—	1
Polujo	—	—	2	—	—	1	2	5
Port. Okc. Afriko..	—	—	1	—	—	—	—	1
Portugalujo ..	—	2	38	6	—	4	3	53
Rodezio.. ..	—	—	2	—	—	1	—	3
Rumanujo ..	—	—	1	—	—	—	1	2
Sarlando ..	—	—	13	1	—	1	—	15
Sieraleono ..	—	—	—	1	—	—	—	1
Sud-Afriko ..	—	2	29	2	—	1	—	34
Sudano	—	—	—	1	—	—	—	1
Svedujo.. ..	1332	107	308	65	—	16	3	1831
Svislando ..	120	52	91	16	—	29	3	311
Tajlando ..	—	—	—	1	—	—	—	1
Trinidado ..	—	—	1	—	—	—	—	1
Turkujo.. ..	—	—	9	—	—	—	—	9
Ugando	—	—	—	1	—	—	—	1
Urugvajo ..	—	1	19	3	—	1	—	24
Usono	436	17	130	33	—	14	2	632
Venezuelo ..	—	—	14	1	—	—	—	15
81 landoj ..	11085	920	3915	611	6	266	58	16861

En 1954 ni tre esperas, ke ni atingos la ciferon 20,000. Certe la komenco estas kontentiga, kiel montras la jena tabelo pri la

Internacia Konkurso 1954

Stato je la 31a de Januaro

	Kvoto	Poentoj	%
1. Urugvajo ..	250	240	96.0
2. Finnlando ..	2000	1805	90.2
3. Svislando ..	1500	1330	88.6
4. Nederlando ..	4600	3190	69.4
5. Hispanujo ..	1600	1080	67.5
6. Germanujo ..	3600	2295	63.7
7. Portugalujo ..	500	290	58.0
8. Britujo ..	9500	5404	56.9
9. Japanujo ..	900	510	56.6
10. Kanado ..	250	140	56.0
11. Danlando ..	2500	1320	52.8
12. Svedujo ..	5900	2845	48.2
13. Aŭstralio ..	1000	480	48.0
14. Venezuelo ..	250	120	48.0
15. Usono ..	2300	1080	47.0
16. Francujo ..	5600	2573	45.9
17. Sud-Afriko ..	300	135	45.0
18. Jugoslavujo ..	1600	705	44.1
19. Norvegujo ..	2300	1005	43.7
20. Kubo ..	250	105	42.0
21. Belgujo ..	2300	899	39.1
22. Irlando ..	250	90	36.0
23. Izraelo ..	250	90	36.0
24. Argentino ..	950	330	34.7
25. Italujo ..	2900	865	29.8
26. Novzelando ..	850	180	21.2
27. Islando ..	350	70	20.0
28. Brazilo ..	6400	1240	19.4
29. Aŭstrujo ..	850	125	14.7
30. Maroko ..	700	85	12.1

Nia Forumo

PAROLAS LA LEGANTOJ

Korespondantoj nepre esprimu sin koncize kaj mallonge. Antaŭ ol sendi leteron por publikigo kontrolu la longon per komparo kun jam presita teksto.

Presigo de letero de korespondanto ne necese signifas ke U.E.A. oficiale subtenas la esprimitajn opiniojn.

Pri la rusa lingvo

La noto pri la rusa lingvo en *Esperanto* (Nov. 1953, paĝo 317) memorigis min pri tio, kion skribis la rusa verkisto Lomonosov, du jarcentojn antaŭ Lenin kaj Stalin !

"La rusa lingvo superas ĉiujn eŭropajn lingvojn. Karlo la Kvina, diradis, ke oni devas paroli hispane kun Dio, france kun siaj amikoj, germane kun siaj malamikoj, kaj itale kun la virinoj. Sed se Karlo estus lerninta la rusan li estas trovinta en ĝi la majeston de la hispana, la vivecon de la franca, la forton de la germana, la simpation de la itala, kaj krom tio, la riĉecon kaj koncizecon de la greka kaj latina !"

Certe, Esperanto havas gravan rivalon !

A. H. Middlemast, Glasgow.

Poemoj de Zamenhof

Laŭ noto en n-ro 576, Novembro 1953, supozas M. C. Butler, ke Zamenhof estas aŭtoro de poemoj, aperintaj sub la plumnomo "Amiko" en *La Esperantisto* kaj en la unuaj jarkolektoj de "Lingvo Internacia".

Ne estas tiel. Paul Nylén, kiu tiam redaktis la L.I. konfirmis al mi, ke tiujn poemojn verkis A. Kofman el Odeso. Tiun informon donis Nylén jam en 1932 al K. R. C. Sturmer, kiu ĝin publikigis en sia verko "El notlibro de praktika esperantisto", aperinta en Budapest 1934.

O. Ginz.

Faktoj pri Norvegujo

Laŭdinda eldonaĵo ĝi estas. Sed troviĝas en ĝi eraro, pri kiu mi ne povas silenti.

Kial la aŭtoroj skribas pri la lingvo : "Ĝis la fino de la 19-a jarcento estis nur unu oficiala lingvo, 'riksmål'—poste nomata 'bokmål', influita de la longe-daŭra unio kun Danujo" ? (Substrekita de mi.)

Ŝajnigi, ke la skriblingvo 'riksmål' —poste 'bokmål'—havas norvegan originon—nur 'influita de' la unio—estas falsaĵo.

Antaŭ pli ol jarcento la danoj protestis kontraŭ tio, ke la norvegoj nomis sian skriblingvon 'norvega'. Ili protestis, ĉar ĝi fakte estis la dana. Nu, ni daŭrigu nomi ĝin 'norvega', malgraŭ la dana origino. Sed ni ne mensogu !

Vidu D-ro Collinder : 'La problemo de lingvo internacia', p. 35. Li i.a. skribas pri "la iagrade norvegigita dana, nomata 'librolingvo' (bokmål)".

Jon Römmesmo.

Singulto

En la poemo sur paĝo 2 de la januara numero aperas la vorto *singulto*, evidente en la senco de iaspeca plorado. Mi deziras atentigi ke tia signifo estas erara, kvankam la vorto jam diversfoje tiel uziĝis. La ĝusta signifo de *singulto* (angle *hiccup*, france *hoquet*) estas montrita en la Universala Vortaro kaj ankaŭ en Plena Vortaro, kaj ĝia uzo por

plorado (eĉ por "singulta" plorado) tendencas al konfuzo. *Singulto* estas fiziologia fenomeno, kaj ni bezonas la terminon kun preciza signifo. La fenomeno povas rezulti el plorado (ankaŭ el drinkado !), sed la vorto per si mem neniel rilatas ĝin : plue, ordinara atako de *singultado* emas ridigi, kaj certe ne plorigi, la ĉeestantojn, se ne ankaŭ la viktimon mem !

Bernard Long.

Ĉiuokaze

Mason Stuttard eraras pri la traduko de la angla esprimo, *in any case*. Mi demandis, sen klarigo, al iu kiu havas universitatan diplomon pri la Franca lingvo, kiel oni traduku tiun esprimon france. Tuj li respondis, *en tout cas*. Ŝajne, do, *ĉiuokaze* ne estas anglaĵo, sed francaĵo !

Oni povus diri, *okazu, kio ajn,* tamen ne 'en la lastaj jaroj' sed jam de multegaj jaroj (vidu la vortarojn de Millidge, Fulcher and Long, ekzemple) *ĉiuokaze* esprimas la saman ideon kiel la angla *in any case.*

Kiel alia laikulo pri la lingvo, S-ro Stuttard, jen mia opinio pri la demando (mi unue parolis Esperanton en 1912).

Ĉiuokaze mi daŭre uzos la vorton en tiu senco eĉ se ĝi ne estas tute korekta (=preciza !).

BM/NSCJ.

Malfrua Raporto

Sendube multaj legantoj miris, legante en la februara numero raporton, kun enhavo parte malaktuala, pri la Belarta Konkurso 1953. Mi deziras klarigi, ke tiun raporton mi redaktis en Julio 1953 kiel prologon al la detalaj raportoj pri la prozaj kaj poeziaj brancoj, kiuj aperis en la novembra kaj januara numeroj, kaj ke la redakcio de *Esperanto* ricevis mian raporton la plej frue el la tri raportoj.

R. Rossetti.

ESPERANTISTA FERIO EN LOFTHUS

11-18a de aŭg. 1954

Venu pasigi vian ferion en belega regiono Hardanger en okcidenta Norvegujo ! Intima, amika kunestado kun gesamideanoj el multaj landoj.

Kombine kun la feria restado estos kurso por studgvidantoj, kiun vi povos partopreni.

Prelegoj, diskutoj, distraĵoj. Allogaj ekskursoj.

Ĉiujn informojn donos

Okc. Distr. de N.E.L.,
Kristian Sivertsen,
Blekenberg 52,
Bergen, Norvegujo.

En la listo de la 10 plej bonaj verkoj aperintaj post la milito (laŭ "Esperanto en Skotlando", "Nederlanda Esperantisto" k.a.) trovigas ambaŭ verkoj de D-ro Ivo Lapenna :

RETORIKO kaj AKTUALAJ PROBLEMOJ

Nuna prezo : ĉiu libro 12 ŝil., afranko 6p.

Se vi ankoraŭ ne legis ilin, mendu tuj ĉe via landa libroservo aŭ ĉe

Universala Esperanto-Asocio,
Heronsgate, Rickmansworth,
Herts., Anglujo



Enigma Konkurso N-ro 86

Solvojn oni sendu al S-ro P. H. Mooy, 28 rue Stuyvenbergh, Brussel II, Belgujo. Por ĉiu tute korekta solvo oni kutime donas 5 poentojn. Ĉiufoje la tri personoj, kiuj havas la plej altajn poentnombrojn, gajnas premion. Ĉiu MA de UEA kun la sama ŝanco povas komenci la sendon de la solvoj je kiu ajn momento. Limtempo por Eŭropo estas du monatoj.

Pliaj informoj, se deziratai, riceveblaj de S-ro Mooy kontraŭ unu respondkupono internacia.

Solvoj :

N-ro 193 : Horizontale : aposteriora - bankopiapip - ilianommoka - tigropeanar - unulienoont - rumanoebria - irotestoulm - eskortoliie - neiatakoton - teomelurint - ornitologio.

N-ro 194 : Hundo bonrasa estas bona por ĉaso. geheno - brusto - arniko - fadeno - stoplo - tubero - teorio - punkto - porcio - miasmo - akselo - drakmo - premio - oksido - detalo - oranĝo - rostro - rebuso - peonio - pinglo - viando - vaporo - plombo - kiraso - anĉovo - apatio - viskio - kloako.

Gajnis la premiojn post kontrolo de la 82-a konkurso : S-ro J. Soyeur (Belg) 148, S-ro L. Anjer (Norv) 148, S-ro C. de Corte (Belg) 146 p.

Enigmo N-ro 197 : a - ar - bro - ci - da - de - di - di - es - fa - go - go - i - ĵo - ka - ka - kli - kol - kru - lo - loj - lon - na - ne ni - ni - no - nuk - o - o - o - o - ob - ok - on - pi - pre - re - re - ro - se - sig - skan - so - sti - te - te - ti - to - to - to - to - toj - u - vo - zo.

El la ĉi-supraj 56 silaboj formu 17 sepliterajn vortojn (la lasta estas sesliitera) laŭ la ĉi-subaj klarigoj. La unuaj literoj, legitaj de supre malsupren, kaj post tiuj la kvaraj literoj, legitaj de malsupre supren, formas esprimon el la Proverbaro de D-ro Zamenhof.

1. Surstrate oni nepre atentu tion ; 2. monato ; 3. verŝajne plej multnombre posedas tion la Biblio ; 4. ŝirmas nin kontraŭ pluvo ; 5. parenco ; 6. oni povas fari tion nur en sufiĉe varma medio ; 7. kaŭzas ofte mensogo ; 8. kokoson oni tiel ne povas nomi ; 9. malnoviĝinta ; 10. tre malofta metalo ; 11. blovmuzikiloj ; 12. havas akran guston ; 13. konsente kaj kontente ; 14. ekskluzive sekvi iun opinion ; 15. soldato ; 16. konsumo de narkotiko ; 17. kontraŭ tio ne helpas protesto.

Enigmo N-ro 198 : La vortoj de kvin esprimoj el la Proverbaro de D-ro Zamenhof intermiksiĝis. Mi donas ilin en alfabeta sinsekvo, kaj vi bonvolu retrovi la esprimojn. alsendas - atendas - donas - fasto - ĝi - ĝin - helpas - insultas - jam - kaj - kiam - kion - komprenas - kontraŭ - kreditoro - la - la - li - morto - ne - ne - ne - ne - nek - ofte - oni - oni - pasanto - plendo - ploro - preĝo - puton - riĉecon - sorto - ŝercon - trinkis - vokas - venas.

Mistera pesado (Solvo) : Numeru la monerojn de 1 ĝis 12.

Unua pesado : Pesu 1 + 2 + 3 + 4 (grupo I) kontraŭ 5 + 6 + 7 + 8 (grupo II).

Kazo A : Estas ekvilibro, tiam ĉiuj ok estas bonaj.

Kazo B : Ne ekvilibro, tiam 9, 10, 11 kaj 12 estas bonaj, kaj ni akceptu ke grupo I estas pli peza ol grupo II. (Se estas male, en la argumentado ni nur ŝanĝu kie necese "pli peza" en "malpli peza" kaj male.)

Kazo A, dua pesado : Pesu 9 + 10 + 11 (grupo III) kontraŭ 1 + 2 + 3 (grupo IV).

Kazo C : Estas ekvilibro, tiam 9, 10 kaj 11 estas bonaj kaj 12 estas la falsa.

Kazo D : Ne ekvilibro, sed ni nun scias, ĉu grupo III (aŭ pli bone la falsa monero) estas pli aŭ malpli peza ol bona.

Kazo C, tria pesado : Pesu 12 kontraŭ bona kaj ni scias, ĉu ĝi estas pli aŭ malpli peza ol bona.

Kazo C, tria pesado : Pesu 9 kontraŭ 10.

Kazo E : Estas ekvilibro, tiam 11 estas la falsa, kaj ni jam scias ĉu pli aŭ malpli peza.

Kazo F : Ne estas ekvilibro, kaj nun la pli peza aŭ la malpli peza estas la falsa, se en kazo D grupo III estas pli aŭ malpli peza.

Kazo B, dua pesado : Ni scias, ke unu el la moneroj el grupo I havas pluspezon aŭ unu el la grupo II havas minuspezon. Nun pesu 1 (+) + 2 (+) + 5 (—) (grupo V) kontraŭ 3 (+) + 4 (+) + 6 (—) (grupo VI).

fino sur paĝo **96**

Esperantista Kulturdomo

Kastelo de Grésillon, Baugé (M. et L.), Francujo

LA kastelo estas beleta. La du manĝoĉambroj kaj la salonoj estas agrablaj, kaj la dudek ĉambroj havas komfortajn litojn. La bieno ampleksas ok hektarojn, kun bela akvejo. Grandaj arboj permesas bonfaran ripozon.

La Esperantista Kulturdomo apartenas al la Esperantistoj kiuj pruntedonis monon. Sed por realigi la aferon laŭ niaj francaj leĝoj ni devis multe pripensi kaj elekti la societan formon: kooperativo. Tio signifas, ke la bieno estas aĉetita kaj meblita per la mono pruntedonita de la anoj de la societo. Por esti societano, ĉiu Esperantisto devas pruntedoni almenaŭ dek mil frankojn. Tio estas unu parto de la asocio. Ĉiu povas alpreni unu, du, tri, . . . aŭ cent partojn. Sed la pruntedonita mono ne alportas profiton aŭ renton, do la asocio ne estas financa afero. Por administri la societon oni kunvenigas la societanojn kiuj decidas pri la diversaj aranĝoj, kaj elektas la estraron de la societo. Sed eĉ, se iu el la societanoj posedas plurajn partojn de la societo, li rajtas nur unu voĉon kiam okazas la baloto. Do la asocio ne povas esti gvidata de kelkaj personoj kiuj povis pruntedoni multe da mono. Tiamaniere ni povas aserti ke la asocio estas kaj restos sub la kontrolo de la Esperantistoj kiuj agis sindoneme por starigi la aferon.

"Por kio vi aĉetis tian bienon?" oni jam diris al ni. Tute simple, ĉar ni konstatis ke multaj Esperantistoj ne havis sufiĉe da okazoj por praktiki la lingvon. Ĉiujare la Grupo de la Esperantistaj Edukistoj (G.E.E.) organizis "someran lernejon". Sed ĉiujare la gvidantoj devis multe klopodi por trovi konvenan lokon, konvenan loĝejon. Niaj someraj lernejoj daŭris nur dum tri semajnoj. Tio ne kontentigis nin. Ni volis krei veran "Esperantujon" kaj ni esperas, ke Grésillon estos baldaŭ tio.

Kompreneble ni multe penis por realigi la asocion, por ricevi la necesan monon. Kiam ni alvokis al la francaj Esperantistoj, ni diris:

"Por realigi tian gravan aferon, ni bezonas ses milionojn da frankoj. Sufiĉas ke 600 Esperantistoj pruntedonu al ni ĉiu 10.000 frankojn, kaj ni sukcesos".

Niaj kalkuloj estis bonaj, ĉar ni elspezis 4 milionojn por aĉeti la Kastelon, kaj 2 milionojn por pagi la litojn, tablojn . . . Sed bedaŭrinde, ni trovis nur 300 Esperantistojn kiuj konsentis pruntedoni monon al ni; do ĉiu devis sendi pli ol 10.000 frankojn.

Ni aĉetis la bienon la 1an de januaro 1952. Dum la printempo ni organizis la aferon, aĉetis kelkajn litojn, tablojn, seĝojn; ni alpruntis aliajn objektojn, kaj la 15an de julio 1952 ni malfermis la Esperantistan Kulturdomon. Multe da objektoj mankis, sed ne mankis la bonvolo, la sindonemo de multaj Esperantistoj. Ekzemplo: por ke brulu la elektra lumo dum Paskaj libertempoj, estis laborintaj 10 kamaradoj kiuj traboris la murojn, almetis 1.500 metrojn da fadenoj, k.t.p.

Dum la jaro 1953 ni povis plibonigi la komforton. Ĉu tio signifas ke nuntempe ĉio estas perfekta? Ne, tute ne. Ni scias, ke mankas ankoraŭ multe da aferoj. Ni scias, ke en niaj ĉambroj ĉiu rajtas trovi ŝrankon,

fino sur paĝo 96



Radio kaj Esperanto

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Mallongigoj : I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso.

Lundo	18.30–19.00	La Coruña. 250m. P.K. Radio Juventud, Real 71, La Coruña, Hispanujo.
	21.35–21.40	Wien. 513m., 48.74m., 25.46m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
	22.15–22.30	Hilversum. 298m., 188m. P. (nur 15-III). N.C.R.V. Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando.
Mardo	11.55–12.00	Bern. 75.28m., 48.66m., 31.46m., 16.87m. P. D-ro Baur. SRG, Kurzwellendienst, Neuengasse 23, Bern.
	14.30–14.45	Montevideo. 280m. P. Radio Ministerio Ganaderia y Agricultura, Montevideo, Urugvajo (nur la unuan mardon de ĉiu monato).
	15.00–15.15	Wien. 203m., 25m., 30m., 41m., 48m. P. (ĉiun duan mardon).
	17.35–17.40	Bern. 75.28m., 48.66m., 31.46m., 19.60m. P. D-ro Baur.
	22.30–23.00	Valencia. 200m. P. Radio Alerta, Colón 11, Valencia, Hispanujo.
Merkredo	15.45–16.00	Graz. 417.2m. K. (ĉiun duan merkredon) Radio Graz, Aŭstrujo.
	16.00–16.10	Caramulo. 205m. I. Rádio Polo Norte, Caramulo, Portugalujo.
	17.50–18.10	Roma. 49.92m., 31.35m. P. S-ro Minnaja. Radio Roma, Casella postale 320, Roma, Italujo.
	19.30–19.45	Barcelona. 360m. I.K. Radio Unión, Emisora del Frente de Juventudes, Barcelona, Hispanujo.
	22.15–22.20	Hilversum. 402m. I. V.A.R.A., Heuvellaan 33, Hilversum, Nederlando.
Ĵaŭdo	07.30–07.35	Lille. 218m. I.K. Radiodiffusion Française, Emission Esperanto, 36 Bd. de la Liberté, Lille (Nord), Francujo.
	08.30–08.45	Paris. 348m. K. Esperanto-Office, Orléans (Loiret), Francujo.
	11.55–12.00	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
	17.35–17.40	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
	23.05–23.30	Zagreb. 264.7m. I. Radio-Zagreb, Jugoslavujo.
Vendredo	17.50–18.10	Roma. Kiel merkrede. P. D-ro Musella.
	21.30–21.45	Gvatemalo. 470m., 197m., 47m., 30.50m. I. Radio Esperanto, la Voz de Guatemala, Gvatemalo, Mez-Ameriko.
Sabato	08.30–09.00	Rio de Janeiro. 375m., 30.71m. K.I. Radio Ministério da Educação, Rio de Janeiro (DF), Brazilo.
	22.15–22.20	Hilversum. 298m., 188m. P. K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum, Nederlando.

Portugala Radio. Por la unua fojo, Esperantlingva voĉo venas al ni el Portugalujo. La stacio estas nur loke aŭdebla, sed baldaŭa plifortigo de la elsendo estas esperata. Nepre sendu al la stacio dankleterojn kaj eventualajn raportojn pri aŭskultado. Ĉiuspecaj Esperantaĵoj, libroj, turismaj prospektoj estos ĝoje akceptataj de la parolanto : Sinjoro Alfredo Sales, Hotel Monteiro de Carvalho, Caramulo, Portugalujo.

Radio Roma. 3-III, Novaĵoj el Italujo ; 5-III, Vicenzo Monti, okaze de la dua centjara datreveno de la naskiĝo ; 10-III, Kvara festivalo de la Itala Kanzono ; 12-III, Leterkesto kaj bibliografio ; 17-III, Karl Vanselow, la verdstela trobadoro ; 19-III, Itala belarta urbo Venecio ; 24-III, Sardinia folkloro ; 26-III, Giacomo Puccini, okaze de la trideka datreveno de la morto ; 31-III, Enrica Crescentini, itala poetino (Marzotto premio 1953, Unua verko).

Bonvolu adresi la korespondaĵojn al Radio Roma, Casella Postale 320, Roma, ne aldonante la nomojn de la prelegantoj.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 258 **2-an de Februaro 1954**

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de Januaro kaj ankaŭ, por komparo, je la fino de Januaro 1953 :

	1953	1954
Asociaj membroj	1812	651
Individuaj membroj :		
MJ	345	425
MA	2113	2174
MS	372	443
Patronoj ..	5	6
DM	259	266
HM	58	56
	3152	3370
	4964	4021

DELEGITOJ

Argentino

Buenos Aires. FD (Industria kemio) : vakas.
Necochea. FD (Filatelo) : A. S. Caruso, str. Arenales 65.
Rosario. D : E. Kohei, Rubén Dario 1751. Tel : 99640.

Aŭstralio

Wodonga (Victoria). D : I. Maddern, 47 Charles St.

Aŭstrujo

Ottendorf. FD (Instruado) : vakas.
Turnau. D : Alois Postl, Döllach 11, Post Au ĉe Aflenz, Stirio.

Belgujo

Lokeren. FD (Fervojoj) : H. Audenaert, Kouterstraatje 6.

Brazilo

Coração de Jesus (Minas Gerais). D : Wilson Veado.
Rio de Janeiro. FD (Literaturo) : J. Moreira, Rua Julia Lopes de Almeida 2, sob.

Britujo

Coventry. D : E. F. Earle, 213 Burnaby Road, Radford.
Leeds. FD (Komerco) : P. Peat, 15 Davies Avenue, Roundhay, Leeds 8.
Scunthorpe. FD (Stenografio) : J. Ancliffe, 74 Cemetery Road.

Ĉeĥoslovakujo

Opava. D : J. Kuznik, Rooseveltova 17. Tel : 2611.

Finnlando

Äänekoski. D : Toivo Parantainen, Liimattala. Tel : Liim. 14.
FD (Turismo) : La D.
Sodankylä. D : Vilho Saarinen, Vuotso.

Francujo

Bischwiller (Bas-Rhin). FD (Lingvoj) : F. P. Kiehl, 10 Rue de l'Eglise.
Claye-Souilly (S. et M.). D : G. Gerrier, 3 Rue de Souilly.
Le Havre. D : vakas.
FD (Komerco) : vakas.
Saint-Cloud. FD (Filatelo) : vakas.

Germanujo

Berlin. FD (Stenografio) : W. Krause, Oldenburgallee 16, Berlin-Charlottenburg 9.
Gronau i.W. D : Rektor G. Podlinski, Eschweg 10. Tel : 2154.
FD (Instruado) : La D.
Niedersessmar (22c). D : H. Roth, Mühle 21.
Solingen. FD (Turismo) : Hermann Dey, Schule Stöcken.

Hispanujo

San Feliu de Llobregat. D : R. Andreu, C. Montserrat 9.

Italujo

Carrara. D : Prof. A. Grosso, Viale Potrignano 4. Tel : 26.94.
FD (Instruado) : La D.

Izraelo

Kfar-Saba. D : Jeraĥmiel Giladi, Eliezer Kvartalo.
Tel-Aviv. FD (Tajloraj aferoj) : N. Drezner, Naĥlat Benjamin 35.

Japanujo

Kisiwada. D : H. Matubara, Nanmatutyô 24.
FD (Katolikismo) : La D.
Osaka. FD (Kooperativismo) : Seitaro Ŝindo, Seikatsu Kyodo Kumiai, Osaka Chotatsu-Cho, Otemai. Tel : 94-0168.

Takamatu. D: S. Kawamura, Kagawa Nôka Daigaku, Hirai-mati, Kida-gun, Kagawa-ken. Tel: Ikenobe 42.
FD (Kemio agrikultura): La D.

Jugoslavujo

Sarajevo. FD (Turismo): A. Kovačević, "Strojorad", Grbavica 13.

Nederlando

Eindhoven. FD (Tuberkulozo, kampanjo kontraŭ): J. Mols, Genneperweg 34.
Leeuwarden. FD (Mondfederalismo): vakas.
FD (Muziko): W. Böttcher, P.C. Hooftstr. 25. Tel: 05100-8898.

Norvegujo

Kristiansund N. D: R. Pettersen, Dalegata 4. Tel: 2051.
Stavanger. D: H. Houen, N. Strandgt. 11. Tel: 22050.
Stortorgnes. D kaj FD: vakas.

Usono

Newark (New Jersey). D: D. Walton, 448 South Orange Avenue. Tel: MA-3-5811.
Wilmette (Illinoise). D: D. Hathaway, 1326 Wilmette Avenue, Tel: 4729.
FD (Blinduloj, edukado de): La D.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Galle, S-ro R., Worms, Germanujo
Borrows, S-ro W. W., Urmston, Anglujo

PATRONOJ 1954

6. Toms, S-ro C. H., Freshwater, Anglujo

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1954

294. Aleman Ruiz, D-ro A., Habana, Kubo
295. Saltcastle, S-ro M., Oxford, Anglujo
296. Jobbins, F-ino A. F., Tunbridge Wells, Anglujo
297. Serra, D-ro P., Aveiro, Portugalujo
298. Amaral, S-ro H., Funchal, Madejro
299. Lopes do Rego, S-ro M., Lisboa, Portugalujo
300. Ayres, S-ro C. N., Saugus, Mass., Usono
301. Svarstad, S-ro I., Los Angeles, Calif., Usono
302. Lacalendola, Prof. A., Bari, Italujo
303. Sgroi, S-ro R., Catania, Italujo
304. Costantini, S-ro L., Milano, Italujo
305. Taccani, D-ro L., Milano, Italujo
306. Fighiera, Prof. G., Torino, Italujo
307. Fabert, S-ro M., Chelles, Francujo
308. Hullin, S-ro, Honfleur, Francujo
309. Ploussu, S-ro A., Grenoble, Francujo
310. Knecht, S-ro F., Casablanca, Maroko
311. Eisele, S-ro J., St. Louis, (Mo.), Usono
312. Fernández, S-ro F., Lugo, Hispanujo
313. Ferrer Soler, S-ro A., La Laguna, Kanarioj
314. Selle, S-ro A., Hage, Germanujo
315. Wink, S-ro J. W., Hildesheim, Germanujo
316. Böhmke, S-ro P., Wiesbaden, Germanujo
317. Carstensen, S-ro T., Ahrensbök, Germanujo
318. Flick, S-ro W., Bad Salzuflen, Germanujo
319. Hauber, S-ro R., Bad Aibling, Germanujo
320. Henneberg, D-ro T., Kamen, Germanujo
321. Hering, S-ro A., Nürnberg, Germanujo
322. Hieronymus, S-ro F., Hamburg, Germanujo
323. Janssen, S-ro F., Oldenburg, Germanujo
324. Jolliet, S-ro L., München, Germanujo
325. Kind, S-ro E., Bonn, Germanujo
326. Krause, S-ro W., Berlin, Germanujo
327. Lamprecht, D-ro H., Essen, Germanujo
328. Schneider, S-ro F., Niedermarsberg, Germanujo
329. Wolff, F-ino A., Rendsburg, Germanujo
330. Simon, S-ro W., Memphis, (Tenn.), Usono
331. Tršär, S-ro D., Dol Logatec, Jugoslavujo
332. Martins da Cruz, S-ro A. B., Benguela, Port. Okc. Afriko
333. Sharpe, S-ro L. A., Chapel Hill, N.C., Usono
334. Abul-Dahab, S-ro F. S., Beirout, Libano
335. Forgeau, S-ro J., La Rochelle, Francujo
336. Boyet, S-ro F., Sarregumines, Francujo
337. Atkinson, S-ro W. G., London, Anglujo
338. Beaumont, S-ro B. B., Huddersfield, Anglujo
339. Bevan, S-ro G., Wrexham, Kimrujo
340. Bridger, S-ro H. J., Bexleyheath, Anglujo
341. Cunningham, S-ro W., West Wemyss, Skotlando
342. Denton, S-ino M. T. D., London, Anglujo
343. Edmondson, S-ino E., Bingley, Anglujo
344. Wong, S-ro C. S., Penang, Malajo
345. Farrell, S-ro P., Blackburn, Anglujo
346. Holden, S-ro J., Rochdale, Anglujo
347. Lane, S-ro E. G., Reading, Anglujo
348. Laurie, S-ro E. J., Bournemouth, Anglujo
349. Laurie, S-ino W., Bournemouth, Anglujo
350. Leather, S-ro A. J., Blackburn, Anglujo
351. Moberly, S-ro E. W., London, Anglujo
352. Morgan, S-ro A. B., Birmingham, Anglujo
353. McDonald, S-ro R. J., Bristol, Anglujo

354. Robinson, F-ino E., Pickering, Anglujo
355. Sly, S-ro K. A., Letchworth, Anglujo
356. Thurgood, S-ro F., London, Anglujo
357. Tweedie, S-ino O., Bournemouth, Anglujo
358. de Vere, S-ino H., Wrotham, Anglujo
359. Williams, S-ro N., Manchester, Anglujo
360. Zeiner, S-ro B. R., Barry, Kimrujo
361. Miralles, S-ro E., Valencia, Hispanujo
362. Janjić, D-ro F., Zagreb, Jugoslavujo
363. Baas, S-ro P. W., Amsterdam, Nederlando
364. Muller, S-ro J. L. Jr., Bussum, Nederlando
365. Sennhauser, F-ino A., Feldmeilen, Svislando
366. Schenker, S-ro A., Emmenbrücke, Svislando
367. Garcia, S-ro R., Montevideo, Urugvajo
368. Klein, S-ro A., Montevideo, Urugvajo
369. Zeballos Morales, D-ro R., Fray Marcos, Urugvajo
370. Bjørnebo, S-ro G., Trondheim, Norvegujo
371. Mauseth, S-ro J., Trondheim, Norvegujo
372. Chipperfield, F-ino B. M., London, Anglujo
373. Klünder, S-ro W., Burgsteinfurt, Germanujo
374. Berger, S-ro J. G., München, Germanujo
375. Dahlmann, S-ro E., Berlin, Germanujo
376. Dücker, S-ro A., Bebra, Germanujo
377. Fritsch, D-ro E., Clenze, Germanujo
378. Treude, D-ro W., München, Germanujo
379. Dauzenroth, S-ro R., San Francisco, Calif., Usono
380. Vedder, S-ro F. W., Miami, Fla., Usono
381. Mitschke, S-ro Fr., St. Petersburg, Fla., Usono
382. Sumner, S-ro Francis H., Bay City, Oregon, Usono
383. Vidack, S-ro J., Seattle, Wash., Usono
384. Goulding, S-ro C., Stoke-on-Trent, Anglujo
384. Knight, S-ino E. B., London, Anglujo
386. Miskimmon, S-ro W. A., Hamilton, Skotlando
387. Geyer, S-ro C. J., Bilthoven, Nederlando
388. Hoekma, S-ro A., Den Haag, Nederlando
389. Hölzenspies, D-ro W., Baarn, Nederlando
390. Ravestein-Basters, S-ino J. M., Den Haag, Nederlando
391. Wolff, F-ino H., San Francisco, Calif., Usono
392. Feneyrol, S-ro M., Boulogne, Francujo
393. Poupart, S-ro R., Auby-lez-Douai, Francujo
394. Malinsky, S-ro A., Franca armeo
395. Marchand, F-ino M., Paris, Francujo
396. Motto, S-ro R., Arles, Francujo
397. Dormont, S-ro L., Brooklyn, N.Y., Usono
398. Riondelet, S-ino Lyon, Francujo
399. Carralot, F-ino J., Tarbes, Francujo
400. da Costa Barbosa, S-ro J., Belém, Brazilo
401. Caetano Coutinho, S-ro A., Rio de Janeiro, Brazilo
402. de Albuquerque, D-ro J. J., Atalaia, Brazilo
403. Figueiredo Farias, S-ro B., Cachoeira, Brazilo
404. Dutra d'Amorim, S-ro N., Maceió, Brazilo
405. Baggi de Araujo, F-ino I., Rio de Janeiro, Brazilo
406. Gomes Braga, S-ro I., Rio de Janeiro, Brazilo
407. Carvalho, S-ro A., Bebedouru, Brazilo
408. Corrêa, S-ro E., Porto Alegre, Brazilo
409. da Costa, S-ro F. F., Filho, Rio de Janeiro, Brazilo
410. Domingues, D-ro C., Rio de Janeiro, Brazilo
411. Falcâo, S-ro F., Belém, Brazilo
412. Domingues de Sá Fortes, S-ro M., Perdoes, Brazilo
413. de Sales Montelo, D-ro F., S. Luiz, Brazilo
414. de Morais, S-ro A., Rio de Janeiro, Brazilo
415. Villa Nova, S-ro T. T., Recife, Brazilo
416. Santos, S-ino Z. C., Teofilo Otoni, Brazilo
417. Siedlecki, S-ro K., Matinhos, Brazilo
418. Borges da Silva, Pastro, Belém, Brazilo
419. Martins de Souza, S-ro J., Juazeiro, Brazilo
420. Teixeira, S-ro D., Belo Horizonte, Brazilo
421. Zamora, S-ro A., Porto Alegre, Brazilo
422. Jung, S-ro T., Scheveningen, Nederlando
423. Strasser, S-ro H., Zürich, Svislando
424. Grahovac, S-ro I., Beograd, Jugoslavujo
425. Bador, F-ino, Tarbes, Francujo
426. Helfgot, S-ro S., Buenos Aires, Argentino
427. Iglesias Nuñez, S-ro E., Buenos Aires, Argentino
428. Augusto, S-ro O., Barra Mansa, Brazilo

429. Deckers, S-ro R. E., Catalão, Brazilo
430. Myrvoll, S-ro M., Nygardsjøen, Norvegujo
431. Skogstrøm, S-ro G., Drammen, Norvegujo
432. Skogstrøm, S-ino L., Drammen, Norvegujo
433. Ramsay, S-ro Ch., East Devonport, Aŭstralio
434. Thaey, S-ro P., Zele, Belgujo
435. Heilberg, S-ro L., Vereeniging, Sudafriko
436. de Jong, S-ro H., Umtata, Sudafriko
437. Van den Heever, S-ro D. J., Bloemfontein, Sudafriko
438. Woodruff, S-ro E. W., Johannesburg, Sudafriko
439. Bull, F-ino E. M., West Leederville, Okc. Aŭstralio
440. Hicks, S-ro S. W., Bayswater, Okc. Aŭstralio
441. Thomson, S-ro R., Kalamunda, Okc. Aŭstralio
442. Banham, S-ro F. R., Essendon, Aŭstralio
443. Smith, S-ro E., Preston, Aŭstralio
444. Blacklock, S-ino L. E., Parkstone, Anglujo
445. Bowell, F-ino B., Bristol, Anglujo
446. Guise, S-ro W. C., Rugby, Anglujo
447. Jordon, S-ro H., Brighton, Anglujo
448. Millidge, Pastro R. G., Sutton, Anglujo

DONACOJ al la Ĝenerala Kaso : J. E. Jackson 2ŝ. 6p., S-ino C. Ellison 2ŝ., F-ino A. M. Powell 10ŝ., C. F. J. Birch, 5ŝ., G. Bevan 5ŝ., E. Grasmeir 5ŝ., D-ro W. Treude 8ŝ., M. Tschöpe 1ŝ., J. Eisele 7ŝ., H. P. Saunders 2ŝ. 6p., J. H. Murray 60ŝ., F-ino H. Wolff 14ŝ., S. W. Hicks 6ŝ., E. F. Earle 7ŝ. 6p., G. Fighiera 2ŝ. 3p.

DONACOJ al la Fondaĵo Montevideo : Esp.-grupoj Krefeld, Uerdingen kaj Neuss 73ŝ., Esp.-grupo Nürnberg 41ŝ., Esp.-grupo Fürth 8ŝ., Esp.-grupo Waidmannslust 41ŝ., Esp.-grupo Walsrode 17ŝ., Esp.-grupo Worms 20ŝ., A. Hering 5ŝ., G. Jocham 5ŝ., F-ino Robin 8ŝ. 6p., C. F. Everts 9ŝ., D. de Boer 9ŝ., Salzburg V.S. Esp. Soc. 20ŝ., S-ino D. M. Worcester 20ŝ., J. H. Murray 20ŝ., M. Pearson 20ŝ., kolektita en Finnlando per J. Vilkki £8 5ŝ. 0p., E. Hurtado 16ŝ. 6p., D-ro A. B. Martins da Cruz 40ŝ., Esp. Soc. "Merkurio" Rotterdam 46ŝ., P. Samijn 3ŝ., Fed. de Centra Montaro, Fr., 20ŝ., Nevers-grupo 20ŝ., Moulins-grupo 30ŝ., Bourges-grupo 20ŝ., S-ro Martin 2ŝ., Vichy-grupo 40ŝ., M. George 20ŝ., Aŭstra Ministro por Instruaj Aferoj £4, I.E.M.W. 16ŝ., S-ino Weber 1ŝ. 6p., Majoro Sinner 1ŝ. 6p,. D-ro Heeber 3ŝ., S-ino Cadenal 20ŝ., Organizantoj de Zagreba-karavano £10.

Sumo ĝis 31.1.1954 : £291 3ŝ. 6p.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

C. C. GOLDSMITH, *Sekretario.*

Mistera pesado : *fino*

Kazo G : Estas ekvilibro, tiam 7 (—) aŭ 8 (—) estas la falsa, kaj ĝi estas malpli peza ol bona.

Kazo H : Ne estas ekvilibro.

Kazo G, tria pesado : Pesu 7 kontraŭ 8, kaj la malpli peza estas la falsa.

Kazo H, tria pesado : Tiun kazon ni dividu en du aliajn.

Kazo K : Grupo V estas pli peza ol grupo VI. Tio estas ebla, se 1 (+), 2 (+) aŭ 6 (—) estas falsa. Se ni nun pesas 1 kontraŭ 2, kaj se ne estas ekvilibro, tiam la pli peza el tiuj du estas la falsa. Se estas ekvilibro, tiam 6 estas falsa kaj malpli peza ol bona.

Kazo L : Grupo V estas malpli peza ol grupo VI. Tio estas ebla, se 5 (—), 3 (+) aŭ 4 (+) estas falsa. Se ni nun pesas 3 kontraŭ 4, kaj se ne estas ekvilibro, tiam la pli peza el tiuj du estas la falsa. Se estas ekvilibro, tiam 5 estas falsa kaj malpli peza ol bona.

Kastelo de Grésillon : *fino*

tablon, seĝon . . . Ni scias ke en la salonoj estus agrable havi pli da brakseĝoj.

Ni scias, ke ekstere oni bezonas ferajn tablojn kaj multajn benkojn. Ni scias, ke mankas pentraĵoj, tapiŝoj . . . .

Ni scias, ke por la kultura vivo ni bezonas pri diversaj aferoj . . . Ni scias . . . ke tio venos, same kiel jam venis la duŝĉambro, la piano.

Ni povas diri al vi : "La kastelo de Grésillon ankoraŭ ne estas luksa, sed komforta. La gesamideanoj kiuj prizorgas ĝin povas doni nur tion, kion ili havas, sed ili donas tion tutkore, ĉar ili estas viaj veraj amikoj".

La Prezidanto, H. Micard.

ANONCETOJ

Kosto : du pencoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkupono por ĉiu duo da vortoj.
Ĉiu anoncanto morale devigas sin respondi minimume unu fojon al ĉiu kiu skribas.
Anonceto por iu numero devas atingi nin antaŭ la 6-a de la antaŭa monato.

Li kvietigas mian animon ; Li kondukas min laŭ vojo de la vero, pro Sia nomo.
Ps. 23. 3.

Kultura Esperanto-Domo akceptas laŭeble de junio ĝis septembrofino ĉiulandajn Esperantistojn. Eventuale iam ajn ankaŭ karavanojn. Informpeto sendota kun internacia respondkupono al Kultura Esperanto-Domo, Grésillon, BAUGE, (Maine-et-Loire), Francujo. Represo petata.

Vizitu la internacian kuracurbon Baden-Baden, loĝante en Esperanto-hejmo. Belega situo, modernaj ĉambroj kun fluanta akvo kaj centra hejtado, balkonoj, banejoj. Taŭga por unuopaj gastoj kaj karavanoj. Moderaj prezoj. S-ino Agnes Miller, "Haus Agnes", Werderstr. 14, BADEN-BADEN, Germanujo.

Ringwood Grammar School (Fondita en 1577), West Hill Road, BOURNEMOUTH, Anglujo, bonvenigas knabojn el Britujo kaj aliaj landoj por eduko cele al Ĝenerala Eduka Atesto aŭ por libertempoj.

Oficejisto, abelbredisto, deziras korespondi kun samideano el Belgujo, Francujo aŭ Germanujo. J. Boer, Opwierderweg 26, APPINGEDAM, Nederlando.

Fervojista kurso finiĝanta serĉas korespondantojn. Johannes Utta, Bergstr. 10, (20) WALSRODE, Germanujo.

Deziras korespondi kun ĉiuj landoj per ilustritaj poŝtkartoj bele afrankitaj, ĉiam respondos, S-ro Jean Réquillard, La croix Moreau, VIERZON (Cher), Francujo.

Turista Informejo (Belgujo) rezervas pensionon kaj hotelĉambrojn. Sendas senpage prospektojn esperantlingvajn pri belgaj urboj (rpk. aŭ samvaloro). Konijnperken 109, BOSVOORDE-Brussel, Belgujo.

Pri ekonomio, financo kaj komerco deziras korespondi T. A. Goldman, 825 East 60th Str., CHICAGO, Illinois, Usono.

Kun danko ni atendas salutojn el ĉiuj anguloj de la mondo por propagando. Ni resalutos. Adr. : Winberg-Rosell, S. Vägen 27, BENGTSFORS, Svedujo.

Esperanto-Turisma-Restoracio atendas gesamideanojn en arta urbo. Skribu : Buffet-Gare, ROUEN, Francujo.

Internacia turisma renkonto en fama franca haveno Le Havre. Skribu amase por letervespero 16an de Majo. "Esperanto", 25 rue Duguay-Trouin, LE HAVRE, Francujo. Certe respondos.

Angla profesorino pri la franca lingvo deziras interŝanĝi lecionojn en la angla kaj franca lingvoj dum la somero kun aŭ sen gastigado. Povas proponi gastigadon en Anglujo. F-ino Olive Robotham, 14 Wensley Road, STOCKTON-ON-TEES, Anglujo.

Gekursanoj ĉiuaĝaj deziras korespondi tutmonde. Prof. Grosso, Potrignano, CARRARA, Italujo.

Letervesperon aranĝos Esperanto-grupo en Aprilo. Adreso : Noordvliet 19, MAASLUIS, Nederlando. Ni certe respondos.

Kun la tuta mondo deziras korespondi 30 diversaĝaj gelernantoj de S-ino Haudebine, pere de S-ro Jørgensen, Tordenskjoldsgade 2—II, AARHUS, Danujo.

Antaŭ Haarlem

SKOTLANDO VOKAS VIN !

INTERNACIA FERIA SEMAJNO

Julio 24a ĝis 30a, 1954

en

Newbattle Abbey Kolegio, proksime al Edinburgh

Modernaj komfortoj - Bonaj manĝaĵoj
Allogaj ekskursoj kaj aliaj distraĵoj
Modera kosto - Nur 60 lokoj

Skribu tuj por detaloj al :

La Sekretario,
Edinburgh Esperanto Society,
20 Glendevon Road, Edinburgh 12,
Skotlando

PRETA PRESKAŬ TUJ

TUTE NOVSPECA LIBRO EN ESPERANTO

ATAKOJ KONTRAŬ ĜARDENPLANTOJ

de D-ro Paul Neergaard

licenciato de hortikulturo, magistro kaj doktoro de agronomio kaj sekciestro ĉe Ŝtata Plantpatologia Servo, Kopenhago; krome, membro de la Akademio de Esperanto.

La libro enhavas proks. 230 paĝojn artpaperajn, 9 paĝojn da bildoj en koloroj kaj proks. 80 aliajn bildojn.

Belege bindita, prezo 20 ŝil., afranko 9p.

Interesa libro por ĉiu, kaj aparte utila por ĉiu ĝardenamanto, ĝardenisto, kaj la propagandisto.

Eldonita de

THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY LTD., ANGLUJO

MENDILO

Al Universala Esperanto-Asocio,
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo.

Bonvolu sendi al mi.....ekz. de "Atakoj kontraŭ Ĝardenplantoj"

por kiuj mi sendas pagon per.....

Nomo..... Dato.....

Adreso.....

Uzu presliterojn

Prefere mendu ĉe enlanda libroservo se tio ekzistas.
(Kompreneble oni povas mendi per letero sen la mendilo.)

Printed by SUMFIELD & DAY LTD., Station Street, Eastbourne, for the Publishers, UNIVERSALA ESPERANTA-ASOCIO, Esperanto House, Heronsgate, Rickmansworth, Herts.